


ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



Afriko:
Radias Zimbabvo

Influo:
Komunan konsilaron!

Kaj la estonteco?

Enhavo

- 121 Eksteraj rilatoj: UEA apelacias ĉe Unesko (Mark Fettes); Plifortigo trans la krizo (P. Lécaille, F. Lo Jacomo, B. Masala)
- 122 Kaj la estonteco? (Jouko Lindstedt)
- 124 Fakaj asocioj: Nomaro por la 21-a jarcento (laŭ informoj de W.M.A. De Smet); IFEF kongresis en sia fondlando (István Gulyás)
- 125 Afriko: Zimbabvo elradias Esperanton (laŭ raporto de O. Mazodze) Azio: Koreio: Printempa modo encentrigi (CHOE Taesok)
- 126 Kalendaro 1996-97
- 127 Intervjuo kun Nora Moerbeek: Kavalirino pro laboro porsocia
- 128 Akademio de Esperanto: Direktoroj atendas kunlaboron
- 129 Speciala sekcio: *Influo* numero 11
Komuna konsilaro pri informiloj (Ziko M. Sikosek);
Fiŝkapti ĵurnalistojn per eta kongreso (Ziko M. Sikosek);
Por senti sin ano de Esperanto (Ian Fantom)
- 133 Recenzoj: *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo* (Carlo Minnaja); *La latina kiel interlingvo. Latein als internationale Sprache* (Janus Di Censo); *Historio de Japanio kaj Koreio: Enkonduko* (Ulrich Lins)
- 135 Laste aperis
- 136 Forumo: For la Esperantan sektismon! (Ziko M. Sikosek)
- 137 Reagoj
- 138 Loke – Fake – Persone
- 139 Anoncetoj
- 140 Nekrologoj
Oficiala informilo

Vi trovos,

kiel ĉiam, la mencion “(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)” sur la kovrilo de nia revuo. Se la rekomendo de iuj ŝparemaj burokratoj akceptiĝus, la vortoj “kaj Unesko” devus tie malaperi (p. 121). Tio estus paradoksa bato en periodo kiam la kunlaboro de UEA kun Unesko ĝuste ricevis novan elanon. UEA ne rigardas senfare la okazaĵojn; nia revuo raportos pri la evoluo de la afero.

Se tia novaĵo agordus vin al pesimismo, prenu antidoton de d-ro Jouko Lindstedt. En freŝdata kaj freŝ-tona festparolado (p. 122-123), la konata finna esperantisto klopodas montri ke, dum Zamenhof estis realisto, ni, la nuna E-komunumo, estas veraj idealistoj. Nian idealismon fundamentas tamen la konkreta sperto ke Esperanto funkcias, kiel tutmonda ilo, pli kontentige ol la angla lingvo, supozata eliminanto de la monda komunik-problemo; nome, Esperanto donas ankaŭ “tutmondan identecon, senton de aparteno al la homaro”.

La kovrilo: Ĉu nia terglobo en unusola mano? Por ke eblu pozitiva respondo al la Lindstedt-a demando “Kaj la estonteco?”, preferindas alia interpreto: nia Tero estu gardata zorge, kiel rompiĝema ovo.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐keast@soback.komet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia planado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ☎+1-613-565-9279; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎+31-50-3613763 [of]; ☐a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎+370-7-228616 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ☎+39-6-39-72-61-69; ☐mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

UEA apelacias ĉe Unesko

En mistera burokrata manovro, unu fako de Unesko lastatempe rekomendis la forigon de UEA el la sistemo de formalaj konsultaj rilatoj, ĝuste kiam la rilatoj kun la Sektoroj pri Edukado kaj Komunikado promesplene evoluas.

En tre supraĵa kaj erarplena raporto, la Fako por Rilatoj kun Neregistaraj Organizaĵoj, taskita pri la raciigo de la tuta sistemo de konsultaj rilatoj, asertis i.a. ke la agadtereno de UEA “estas tre margena al la prioritatoj de Unesko”.

UEA tuj apelaciis ĉe la Ĝenerala Direktoro, s-ro Federico Mayor, kaj entre-

prenas plurajn aliajn paŝojn por renversi la rekomendon. Entute pluraj centoj da organizaĵoj estas simile traktitaj de Unesko. Ni tamen supozas ke nur malmultaj el ili tiel longe, amplekse kaj fidele kunlaboris kun la Organizaĵo, aŭ havas tiom da komunaj intereso.

Kvankam tiu malagrablaĵo montras daŭran malamikecon al Esperanto

ĉe iuj oficistoj en Unesko, necesas substreki ke troviĝas tie ankaŭ multaj sinceraj amikoj. Aparte ni menciuj la nunan Asistan Ĝeneralan Direktoron pri Komunikado, Henrikas Yushkiavitchus, kiu priparolos la situacion kun UEA-delegacio la 27-an de junio.

Atendeble la aferoj enordigos jam post kelkaj semajnoj. Ni kompreneble senprokraste informos niajn membrojn pri la plua evoluo. Dume legu ĉi-sube raporton de esperantistaj reprezentantoj ĉe Unesko.

Mark Fettes

Estrarano pri eksteraj rilatoj

Plifortiĝo trans la krizo


Ĉi-jare konkretiĝis la restrukturado de rilatoj inter Unesko kaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-j): granda malordo kaj krizo.

La nova sistemo postulas grupigon de po kelkaj asocioj sub “ombrela” asocio, tiel ke Unesko havu je ĉiu temo nur unu kunparolanton. Nuntempe, tiu raciigo de la rilatoj kostas multe da strebado, tempo kaj diskutoj. Diversaj aktivaj asocioj ja vidis sian statuson rekonfirmata — prave kaj juste —, sed aliaj, ne malpli aktivaj (inter ili UEA) estis malbone traktataj de Unesko-burokratoj, laŭ kies rekomendo la nuna Plenumkomitato de Unesko petis la Ĝeneralan Direktoron ĉesigi la formalajn rilatojn kun ĉi tiuj.

La kazo de UEA estas aparte grava: tiom ke en la ĝenerala konferenco de NRO-j ĉe Unesko (17-21 junio) reprezentantoj de multaj aliaj asocioj esprimis miron pri la eventuala eksigo de la konata kaj agema UEA, kaj instigis ke nia asocio kandidatiĝu por la Konstanta Komitato de NRO-j ĉe Unesko. Tamen, pro la negativa rekomendo de la Plenumkomitato, UEA formale ne povis tion fari, kaj letero de direktora instanco atentigis ke kandidatiĝo de UEA kaŭzus seriozan konflikton inter la NRO-j kaj Unesko. Volante nepre eviti tian konflikton, nia reprezentanto, Barbara Despiney, retiris la kandidatiĝon. Tiu ago estis solene aplaudata de la solidara ĉeestantaro. Nun en la Konstanta Komitato pluraj seĝoj malplenas, ĉar ne estis

sufiĉe da kandidatoj kiuj plenumis ĉiujn kriteriojn!

Ĝis nun UEA havis konsultajn rilatojn kun Unesko en kategorio “B”, kaj ILEI ĝuis rilatojn en kategorio “C”. Nun la statuso de UEA ĉe Unesko estas tre malbona, dum pri



tiu de ILEI ankoraŭ ne naskiĝis decido. Ilia forigo estus des pli maltrafa ĉar lastatempe esperantistaj reprezentantoj pli ofte kontribuis al Unesko-aranĝoj. Ene de malpli ol unu monato, en du Unesko-eventoj partoprenis esperantistoj: 1) junulara konferenco, fine de majo (Helène Barković kaj Jimmy Stryhn Meyer), instigita de la Konstanta Komitato de NRO-j ĉe Unesko; 2) la menciita ĝenerala konferenco de NRO-j (Marcel Delforge, Barbara Despiney, Pascal Lécaille, François Lo Jacomo kaj Bruno Masala). Do, pli da esperantistoj ol antaŭe, kaj el pluraj horizontoj: UEA, ILEI, Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO. Ĉiu intervenis kaj konigis niajn asociojn. Aperis nova interesiĝo: ĉu fariĝas

nova teamo da agantoj ĉe Unesko? Barbara Despiney emas konkludi ke tiu ĵus pasinta konferenco signifas komencon de tria epoko en la UEA-agado ĉe Unesko, post tiu de Lapenna, post tiu de Tonkin kaj la Pariza grupo.

Vere ni sentis ke esperantistoj havas ion por proponi al internaciaj organizaĵoj kaj devus pli intense kontribui al la celoj de Unesko (ekzemple pere de Monda Kunagado, kiu nun atendas renaskiĝon, kaj per Unesko-kluboj). Unesko nun enkondukas vastan programon pri packulturo: en la koncerna laborgrupo oni multe babilis pri la disradiado de pacmesaĝo, pri elradikigo de malamo al la

malsamo, pri graveco de agresemo kaj batalemo en la homa psiko ktp. Cetere, ankaŭ pri la malfacileco por internaciaj institucioj kiel Unesko vere komuniki kun la tutmonda homa socio. Reprezentantoj de ILEI forte substrekis la gravecon, por konstruo de packulturo, de instruado de la internacia lingvo mem: ĉiu havu proprajn rimedojn konstrui sian propran internacian kulturon, kaj konsekvence aktive partopreni la disvolviĝon de packulturo. Nur internacia lingvo komuna, apud kaj harmonie kun ĉiuj aliaj lingvoj, ebligas tian personan enplektiĝon, kiu ne estu nure pasiva ricevado de pacmesaĝo.

Pascal Lécaille, François Lo Jacomo, Bruno Masala (Francio)

Kaj la estonteco?

Jouko Lindstedt, profesoro en la Universitato de Helsinko pri slavaj lingvoj, kunverkinto de la Manifesto de Raŭmo (1980), iama redaktoro de *Planlingvistiko* kaj prizorganto de la komputil-reta diskutejo “denask-I” pri Esperanto kiel denaska kaj hejma lingvo, prezentis jenan prelegon, la 20-an de aprilo, en la festo de la Tamperea Esperanto-societo Antaŭen okaze de ties 75-jariĝo.

Eĉ kiam ni festas nian historion, ni ne povas ne pensi pri la estonteco. Eĉ se nia laboro por kaj per Esperanto estas grandparte motivita de niaj per sonaj spertoj en la Esperanta komunumo, ni tamen sentas ke al nia laboro donos plenan signifon nur la estonteco — la tempo kiam la avantaĝoj de nia lingvo estos fine rekonitaj de la mondo. Sed la mondo nuna ne kredas al tia estonteco, kaj ankaŭ ni mem povas de tempo al tempo dubi. Kio povus konvinki nin pri la okazantaĵoj?

Antaŭ preskaŭ cent jaroj, Lazaro Ludoviko Zamenhof multe meditis pri tiu demando. En la jaro 1900 pretiĝis lia fama eseo “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia”, kiu ne senkaŭze eniris kaj la Fundamentan Krestomation kaj la Novan Esperantan Krestomation, eldonitan en 1991. Legante tiun eseon ni povas konstati ke 13 jarojn post la publikigo de Esperanto la argumentoj por kaj kontraŭ ĝi estis jam pli-malpli la samaj kiel ili estas nune. Kun sana memfido Zamenhof pruvas al sia tempo, kaj ankaŭ al la nia, ke raciaj argumentoj kaj objektivaj kaŭzoj iom post iom igos la tutan mondon enkonduki Esperanton. Ĉu ni plu povas partopreni en liaj certeco kaj konvinkiteco?

La argumentoj de Zamenhof estis bazitaj sur la konvinko ke la homa historio estas progreso — ke por diversaj problemoj oni fine adoptas la solvojn plej praktikajn kaj justajn, eĉ se tio ofte postulas longan tempon. Por ni povas jam esti malfacile kredi ke la homaron nepre atendas bela estonteco; sed eĉ se ni ja konsideras progreson ebla, la estonteco estas por ni io esence pli necerta ol ĝi estis por la aŭtoro de Esperanto.

Zamenhof ne povis antaŭvidi la rapidan disvastiĝon de unu nacia lingvo, la angla, al plej diversaj funkcioj de internacia komunikado. Li emfazis la facilecon kaj flekseblecon, kiuj faras Esperanton pli oportuna en internacia uzo ol ĉiuj naciaj lingvoj, sed li ankaŭ pensis ke neniu el tiuj povas atingi la pozicion de lingvo internacia, pro la sola kialo ke aliaj nacioj ne permesus “tian grandegan superforton super ĉiuj aliaj popoloj”, kiel li skribas. Sed ni renkontas ĉiutage samlandanojn niajn kiuj volonte donas superforton al la angla lingvaj landoj kaj konkuras unu kun la aliaj pri tio kiu plej sklave imitas la tiean komercan kulturon. Tian konduton Zamenhof ne povis antaŭvidi, ĉar li kredis ke la mondon unuigos la racio — sed ĝin efektive unuigas la mono.



Raciismo kaj idealismo


Suprize montriĝas ke la idealisto Zamenhof estis fakte raciisto, dum ni estas idealistoj. Kion mi celas estas jeno. Li kredis ke ĉar Esperanto estas la plej justa kaj praktika solvo de la monda lingvo-problemo, pli-malpli frue ĝi nepre venkos; sufiĉas nur pacience labori por tiu celo. Pluraj el liaj praktikaj argumentoj — do tiuj emfazantaj la praktikajn avantaĝojn de unusola lingvo internacia — fakte perdis parton de sia forto post la disvastiĝo de la angla. Des pli gravaj montriĝas nun al ni liaj ideoj argumentoj: ni celas al demokratia komunikado tutmonda, kaj la angla lingvo neniam povos al ni proponi (aŭ ĉu mi komerce diru “oferti”?) tiajn egalecon kaj justecon, facilon kaj flekseblon, kiajn ni postulas.

La estonteco, pravigonta nian nunan laboron, do ne estas io kio nepre venos laŭ logika neceso; ĝi estas io kion ni metas por ni kiel la celon, io al kio ni strebas. Sed ne temas pri nura ĥimero: la grandegaj politikaj ŝanĝoj lastatempaj en Meza kaj Orienta Eŭropo pruvis ke kelkfoje la realistoj montriĝas malpravaj, kaj la idealistoj montriĝas la plej grandaj realistoj. La esperantistoj oferas siajn tempon kaj energion por la estonteco, sed ili ja vivas en la nuno. Oni nomas nin nerealistaj, ĉar ni kvazaŭ ne deziras rekonii la jaman venkon de la angla lingvo. Sed mi asertas ke preskaŭ ĉiu esperantisto regas la anglan almenaŭ tiel bone kiel ne-esperantistoj kun kompareblaj loĝloko, eduko kaj profesio — ofte eĉ pli bone. Ĉu ni do estas nerealistaj, se la angla ne sufiĉas por ni? Sed tute reale ni ja ricevas de Esperanto ion kion la angla ne povas doni:



Supre:
Jouko Lindstedt
prelegas en nia
pasintjara
kongresurbo.

Maldekstre:
J. E. Leppäkoski
majstre tradukis
la finnan nacian
epopeon Kalevala.
Ĉu sekvos
esperantiganto
de Mika Waltari
(1908-79),
la plej multe
tradukita
finna verkisto
ĉi-jarcenta? —
demandas Lindstedt.



tutmondan identecon, senton de aparteno al la homaro. Ion realan ni posedas, ion kion ni deziras prizorgi, disvolvi kaj kreskigi.

Mi kredas ke la kvanta kresko de Esperanto estos ebla nur pere de kvalita kresko. Ne mankas taskoj ankaŭ en la finna movado tiurilate. Ni bezonas modernan lernolibron.

Ni bezonas grandan vortaron finnan-Esperantan. Ĉiu el ni devas plibonigi sian propran lingvoscion kaj serĉi pliajn praktikajn utiligeblojn de Esperanto. Ni povas esperi ke iam aperos la granda finna Esperanto-verkisto aŭ poeto kiu viciĝos en la sekva Esperanto-Krestomatio apud Magnus Nordensvan kaj J.E. Leppäkoski, aŭ ke aperos almenaŭ la tradukisto de Waltari. Ni povas esperi ke inter ni aperos kelkaj denaskaj parolantoj de la lingvo. Kaj fine, ĉi tiun kreskantan kvaliton nian ni devos pli efike montri al la ekstera mondo — kaj tiu do iros en librovendejon serĉi la lernolibron kaj la vortaron kiujn ni espereble estos produktintaj.

La esperantistoj ne ĉiam sufiĉe komprenas la nepran ligon inter la kreskoj kvalita kaj kvanta. Iuj revas pri rapida enkonduko de Esperanto en finnajn lernejojn, ne memorente kiel malmulte da kompetentaj instruistoj kaj lernomaterialo ni disponas. Aliaj revas pri rapida enkonduko de la lingvo en la Eŭropan Union, ne pensante ke post tio pri la formo kaj evoluo de Esperanto decidus la potenca Unia administracio, ne plu la esperantistoj.

Maturiĝu ankaŭ la komunumo

Mi plene konsentas kun Claude Piron kiam li skribas ke laŭ historia perspektivo la rezisto kontraŭ Esperanto havis pozitivan efikon. Mi citas: “Tuja ĝenerala akceptado de la lingva embrio kunmetita de Zamenhof submetus ĝin je distreĉiĝoj, el kiuj ĝi ne eliĝus vivanta. Tiustadie, ĝi estis tro delikata, tro nekompleta. Ĝi bezonis sufiĉe longan vivperiodon en limigita, sed multkultura medio, por ke la necesaj alĝustiĝoj efektiviĝu, ke la signifokampoj difiniĝu, ke korektiĝu la mankoj plej nature, per uzado.”* La argumento de Piron estas, do, ke la malrapida progreso de Esperanto estis necesa por ke la lingvo havu tempon maturiĝi por uzoj plej variaj kaj vastaj. Sed ankaŭ la esperantistoj, la movado, la Esperanto-komunumo ja devas maturiĝi, por ke ili ne nur vartu lingvon kiun la mondo povos transpreni, sed ankaŭ gardu tian tuthomaran spiriton kiu faras tiun lingvon inda je transpreno. Ni deziras ke ni estu pli multaj. Sed ni devas ankaŭ deziri ke ni estu pli kleraj, pli kulturitaj, pli toleremaj. Tiam, kaj nur tiam, ni rajtas akcepti la torĉon de niaj antaŭuloj kaj transdoni ĝin antaŭen, al la posteuloj, al la estonteco. Ni ne scias kia estos la estonteco; sed ni intencas ĝin lumigi.

Jouko Lindstedt

*“Psikologiaj reagoj al Esperanto”, en *Nova Esperanta Krestomatio*, UEA: Rotterdam, 1991, p. 334.

Kotizoj Adelajdo

La bazaj kotizoj ne ŝanĝiĝis por la 82-a Universala Kongreso de Esperanto (Adelajdo, Aŭstralio, 19-26 julio 1997): 215 gld. por Individua Membro (IM); 270 por ne-IM; 162 por IM en B-lando; 202 por ne-IM en B-lando. Junuloj, kunuloj, komitatanoj kaj handikapuloj: IM 107, ne-IM 162 (B-tarifaj landoj: IM 81, ne-IM 121). Sed bonvolu noti ke ja ŝanĝiĝis la kotizperiodoj. **La unua periodo, dum kiu validas la plej favoraj kotizoj, daŭras ne plu ĝis la jarfino, sed nur ĝis la fino de septembro.** Ne maltrafu eblajn rabatojn!

Nomaro por la 21-a jarcento

Antaŭ 25 jaroj, la 21-an de julio 1971, kvar biologoj kaj du simpatiantoj fondis Asocion por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturado (NBN) por antaŭenigi la aplikadon de novspeca nomsistemo en biologio.

La ideoj kaj reguloj pri tiu nova maniero de nomado aperis du monatojn pli frue en *Scienca Revuo*. La fondantoj deziris ke la asocio estu organizaĵo ne nur Esperanta, sed plurlingva, por atingi diversajn mediojn de biologoj, natur-esploristoj kaj ŝatantoj, terminologoj, komputikistoj ktp.

La asocio celas enkonduki novan nomaron por indiki la speciojn kaj aliajn taksonojn de bestoj, plantoj k.a. La scienco jam pli ol du jarcentojn uzas por tio nomojn konsistantajn grandparte el latinaj kaj grekaj vortoj, ordigitajn laŭ sistemo kiun iniciatis la sveda sciencisto Lineo, sed kiu forte devojiĝis en postaj jardekoj. La internacia lingvo Esperanto aparte taŭgas

por krei konvenan nomaron, konforman al la scioj kaj bezonoj de la 21-a jarcento. Tia nomaro estas NBN, kiu suriras tute novan vojon. Ĝi lasas la kadukiĝintan tradician nomaron al ĝia sorto, kaj same flankklasas la personojn kiuj, malgraŭ rekomendoj de eminentuloj kiel Wüster, Neergaard, Makkink k.a., esperantigas ekzistantajn sciencajn nomojn.

Valoras noti ĉi tie ke la ĝenerala sekretario de Internacia Unuiĝo de Biologiaj Sciencoj, d-ro E. Younès, aŭdinte pri la avantaĝoj de NBN, publike deklaris (en 1991, dum simpozio de nomenklaturistoj) ke la venontaj generacioj de biologoj uzu Esperanton prefere ol la latinan. Aliajn

laŭdajn vortojn skribis aŭ diris pluraj eminentuloj.

En 1996 nia asocio havas ĉ. 250 personojn aŭ instituciojn aliĝintajn el pli ol 50 landoj; ĝi uzas kvar lingvojn (Esperanto, angla, franca, nederlanda); ĝi eldonis dek du librojn; ĝi havas oficialan statuson, estraron de tri biologoj kaj plurajn komisionojn, sidejon en Belgio (Hertendreef 12, BE-2920 Kalmthout), kontaktojn kun diversaj sciencaj medioj; jam pli ol 2000 nomoj estas registritaj kiel NBN-nomoj, specife en la lastaj tri jaroj, la plej aktiva periodo.

Kvankam nia Asocio festos sian 25-jariĝon oktobre en Belgio, la Esperanto-publiko havos okazon ankaŭ dum la Praga UK, en la naskiĝtago mem (la 21-an de julio), konatiĝi kun asocio kiu per sia plurlingva agado vekas specialan atenton pri la avantaĝoj de la lingvo Esperanto por la sciencoj.

Laŭ informoj de Wim M.A. De Smet (Belgio)

IFEF kongresis en sia fondlando

Internacia Fervojista E-Federacio (IFEF) kongresis, la 48-an fojon, en la moderna ĉefstacio de Hago, de la 11-a ĝis la 17-a de majo, kun 295 partoprenantoj el 21 landoj.

Dum la inaŭguro salut-parolis Hans de Mooy (Nederlandaj Ŝtatfervojoj), Wil Nelissen (FISAIC, Internacia Federacio de Artaj kaj Intelektaj Asocioj de Fervojistoj), Ans Bakker-ten Hagen (Esperanto Nederland), Antje Noordewier (TANEF, e-istaj naturamikoj) kaj Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA, kiu emfazis ke IFEF estas la plej forta kaj laborema faka asocio. La prezidanto de IFEF, Per Engen, menciis la gravan rolon de Nederlando en la historio de IFEF: la federacio naskiĝis en Amsterdamo, dum 16 jaroj ĉiuj ĝiaj estraranoj estis nederlandanoj, kaj jam la kvaran fojon ĝi kongresas en la lando.

La ĉefprelego, bone ilustrita per lumbildoj, temis pri la historio de la trajntrafik-reĝejo en Amsterdamo. Ses mallongaj prelegoj traktis temojn kiel "Aŭdaca novkonstruo de fervojponto trans la riveron Aare" aŭ "E-klarigoj en fervojaj horaroj". En la kunsido de la Faka Komisiono prezentiĝis la 5-a numero de *Fervojfakaj Kajeroj*.



Speciala historia trajno atendas la kongresanojn en Hoorn.

Rilate al la terminaro de Internacia Fervoj-Unio (UIC), la kunsidanoj ekzamenis 1250 novajn Esperantajn tradukojn de diverslandaj kunlaborantoj. Kun ĉi tiuj, jam 12 300 fakterminoj estas pretaj. La plej gravaj taskoj de la terminara laboro estas kompili proponojn por UIC, traduki la difinojn de fakaj esprimoj, fervoj-fake helpi la reviziadon de PIV, kaj instigi la landajn sekciojn de IFEF eldoni nacilingvajn fakvortarojn.

(per vaportrajno kaj ŝipo), kaj la Centran Oficejon de UEA.

Dum la solena fermo la prezidanto de FISAIC, Gilbert Schmit, esperantlingve dankis pro la kunlaboro inter FISAIC kaj IFEF, kaj transdonis oran medalon al Henning Hauge, kasisto de IFEF. La venontaj kongresoj okazos en Košice (Slovakio, 1997), Aalborg (Danio, 1998) kaj, verŝajne, Maribor (Slovenio, 1999).

István Gulyás (Hungario)

Zimbabvo elradias Esperanton

En aprilo kaj majo Oliver Mazodze (Zimbabvo) instruis Esperanton en kvar sud-afrikaj landoj kie maloftas ĝiaj parolantoj: Zimbabvo, Zambio, Malavio kaj Mozambiko.

Oliver Mazodze, UEA-delegito en Zimbabvo, fondinto kaj direktoro de Zimbabva E-Instituto (ZEI; vd. maj. '95, p. 98), estas diplomita Cseh-instruisto. De la 8-a ĝis la 12-a de aprilo li gvidis kurson en Masvingo, ĉe la altlernejo Gokomere, por 20 geinstruistoj el zimbabvaj lernejoj, kun la celo ke ili starigu kaj gvidu Esperanto-klubojn en siaj lokoj. La solenan fermon ĉeestis la provinca direktoro de la ministerio pri edukado, kiu enmanigis atestojn al la partoprenintoj.

Dank' al monhelpo de Eduka Fondaĵo Carson (Kanado), Mazodze poste veturis al Zambio, Malavio kaj Mozambiko, kaj instruis la internacian ling-

von per mem-verkita materialo ĝis la 7-a de majo. Rezulte de lia instruvojaĝo, nun troviĝas E-aktivuloj kaj -klubo en Bulawayo, Gweru, Harare, Masvingo,

Mutare (Zimbabvo), Luanshya, Lusaka, Mfuwa (Zambio), Blantyre, Lilongwe (Malavio) kaj Tete (Mozambiko).

Mazodze planas en aŭgusto novan instruvojaĝon al Bocvano kaj Namibio. En Zimbabvo — reage al petoj de pluraj lernejestroj — li planas aranĝi, eble en decembro, novan kurson por instruistoj.

Laŭ raporto de Oliver Mazodze



AZIO

Koreio: Printempa modo encentriĝi

Ĉiu Esperanta aktivulo scias kiom gravas ke E-organizo havu propran, modernan oficejon. Facilas do kompreni la ĝojon de koreaj esperantistoj pri tri novaj lokaloj, malfermitaj la ĵusan printempon.

Korea E-Asocio (KEA) havas ses filiojn dise tra la lando. El ili nun du disponas propran oficejon. Krome, la ĉefa oficejo de KEA translokiĝis en la centron de Seulo: malfermiĝas novaj pordoj al progreso!

La filio en Taejon-Ch'ungnam jam de 1991 havas oficejon, danke al sia iama estro, mecenato LEE Okwon (1928-1995). La 3-an de februaro ĝi translokiĝis en la centron de la urbo, je facila atingo de la ĉefa stacidomo. (Adreso: Esperanto-Domo, Tachungdong 210 #2, Chunggu, KR-301-010 Taejon.) Al la 50 000-guldena kosto de la 50-m²-a nova ejo kontribuis plejparte hereda donaco de LEE Okwon.

Ankaŭ en Taegu, la urbo kie en la jaroj 50-aj kaj 60-aj pulsas la koro de la landa E-movado, ekfunkciis nova, 70-m²-a oficejo urbocentra, la 17-an de marto. (Esperanto-Domo, Hasodong 31-2, Chonggu, KR-700-210 Taegu.) La 50 000-guldenan prezon kovris privataj donacoj. La inaŭguron prezidis televidisto CHONG Hyonjo,

kaj salutparolis la prezidantoj de UEA kaj KEA, LEE Chong-Yeong resp. Puramo Chong.

La 17-an de marto la direktoraro de KEA decidis transloki ties centran oficejon en la mezon de Seulo. La 100-m²-a lokalo kostas 200 000 guldenojn. La ĝisnuna oficejo en urbo najbara al Seulo bonege servis por la administraj laboroj de la 80-a UK, sed laŭ nova postulo la oficejo devas motori por oftigi renkontiĝojn, kunvenojn kaj kursojn. La 13-an de aprilo KEA inaŭguris la novan ejon kun 70 esperantistoj. (Adreso: Korea E-Asocio, Nagwondong 50-9, Chongnogu, KR-110-320 Seoul.)

Simpozio pri komuna historio

La Seula E-Klubo kaj "E-grupo por komuna lernolibro pri historio" (Japanio) kunorganizis en Seulo, la 26-an kaj 27-an de aprilo, simpozion pri la rilato-historio de Japanio kaj Koreio. Partoprenis 12 e-istoj el Japanio kaj 20 el Koreio. En amikec-plena

etoso aŭdiĝis prelegoj kaj diskutoj pri la aparteno de la insulo Tokto/Takesima, la invado kaj malvenko de la japana armeestro Tojotomi Hidejoŝi en 1592-98, la japana regado en Koreio, vivo de koreino en Japanio, la originoj de la divido de Koreio ktp. Petr Chrdle (Ĉehio) preleg-recenzis verkon de KUBOI Norio, sur kiu baziĝis la simpoziaj temoj [vd. recenzon sur p. 134.] Oni planas aranĝi similan simpozion printempe de 1997 en Japanio.

CHOE Taesok (Koreio)

Ĝustigo

El la ĉapitro "Financo" de la Estrara Raporto (jun., p. 107) ĉe la fino de la subĉapitro "Spezokonto", elfalis kelkaj vortoj. Legu ĝuste: "Temas pri deskribo je 1% (6 300 gld.) de la stokoj de la Libro-servo kaj Eldona Fako, kaj pri pago de 7 000 gld. al la pensia rezervo."

Kalendaro 1996-97

Ĉi-sube sekvas daŭrigo kaj kompletigo de nia marta aranĝo-listo (p. 53-56). Informoj pri eventoj tie jam anoncitaj estas nur parte ripetataj. La venonta "Kalendaro" aperos en novembro.

konstante

Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎/☎+41/39/267-407

Kvinpetalo, route de Civaux, FR-86410 Bouresse, Francio; ☎+33/49-42-80-74

Interreto. Daŭre aktualigata listo de ĉiuj konataj E-aranĝoj estas konsultebla ĉe la TTT-paĝoj de *Eventoj*: <http://www.odin.net/esperanto/>. Se vi ne havas aliron al TTT, sendu jenan retmesaĝon al cw3mail@gmd.de: "get ftp://ftp.odin.net/pub/esperanto/kalendar.txt".

julio

20-27: **81-a Universala Kongreso de Esperanto**, Prago, Ĉeĥio (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Kulturo: valoro aŭ varo?")

27-02: **30-a Konferenco kaj 4-a Gimnazio de ILEI**, Tábor, Ĉeĥio (Vladimír Dvořák, Zeleněšská 354/20, CZ-19400 Praha; temo: "Rimedo por bona lernado kaj memlernado de E-o"; gimnazio por geknaboj inter 13 kaj 16 jaroj)

29-05: **52-a Internacia Junulara Kongreso**, Güntersberge, Germanio (Holger Boos, Kräuterweg 25, DE-51069 Köln; ☎+49/221/685-597; ☎a2659212@mail.rrz.uni-koeln.de; temo: "Formoj de kunvivado")

aŭgusto

06-10: **Praktikado kaj instruado de E-o**, Kvinpetalo, Bouresse, Francio (adreso supre; gvidas Katalin Smidéliusz)

06-11: **5-a Kultura E-Festivalo**, kun Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, Kopenhago, Danio (Jacob Nordfalk, Rådmandsgade 53, 2. th., DK-2200 København N.; ☎+45/31-83-82-20; ☎35-32-04-60; ☎nordfalk@fys.ku.dk)

07-17: **36-a Okcidenta Somera E-ista Junulara Tendaro (OKSEJT-36)**, Taganrog, Rusio (Garik Kokolija, a/k 31, RU-117071 Moskva; ☎root@marine.rnd.ru; temo: "Movadoj")

09-10: **83-a Japania E-Kongreso**, Hiroŝimo, Japanio (p/a Osika, Ōgonzan-tyō 7-15, Minami-ku, Hiroŝima-si, 734; ☎/☎+81/82/286-27-45)

13-17: **Mitoj kaj diaĵoj en la literoj**, Kvinpetalo, Bouresse, Francio (adreso supre; gvidas Marco Picasso)

13-19: **10-a Internacia Junulara Semajno**, Eger, Hungario (Dávid Alko Golden, Damjanich u. 1/c, HU-8200 Veszprém; ☎goldend@hal2000.hal.vein.hu)

16-27: **2-a Arkeologia Laborkampo**, Blera, Italio (Pier Luigi Cinquantini, via Dante Alighieri 2, IT-01010 Blera; ☎+39/338/484-790; ☎cinquant@mbox.vol.it)

22-25: **Unua Azia Kongreso de E-o**, Ŝanhajo, Ĉinio (Wei Yuan-shu, 550 Dalian Road (w), CN-200083 Shanghai; ☎+86/21/65-42-33-39, ☎65-42-79-00; temo: "Azio kaj la 21-a jarcento")

30-04: **29-a Popteatra Internacia Festivalo**, Zagrebo, Kroatio (IKS, pp 499, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/660-16-19)

septembro

06-10: **10-a Kongreso de Itala Katolika E-ista Unuiĝo**, Paderno del Grappa, Treviso (Franca Concina, Strada Lucento 73, IT-10151 Torino; temo: "Fidelaj al Petro")

09-16: **Internacia E-semajno kun 3-nivelaj kursoj**, Sète, Francio (Centre Culturel Espéranto, 5 rue docteur Roux, FR-34000 Montpellier)



12-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES), 4-6 oktobro, Pollando

12-15: **Mikologia seminario**, Poprad, Slovakio (Esperanto – Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad, Slovakio; ☎+42/92/32-419)

20-22: **Aŭtunaj Tagoj**, Enontekiö, Laponio, Finnlando (Päivi Saarinen, Pitkämäenkatu 23 as 9, FI-20250 Turku; ☎+358/21/239-55-73)

27-04: **Hungaria E-semajno** (Hungaria E-Asocio, Andrásy út 27, HU-1061 Budapest; ☎+36/1/268-03-06; ☎268-03-31; temo: "Turismo kaj komunikado")

28-29: **La streso: kiel eviti kaj superi ĝin?**, KCE, La Chaux-de-Fonds, Svislando (adreso supre; prelegas Tazio Carlevaro)

oktobro

02-06: **Seminario "Kiel fari radio- kaj videovarbilajn?"**, Glienicke ĉe Berlino,

Germanio (E-Junularo Brandenburg/Berlino, Berliner Str. 49, DE-14467 Potsdam, Germanio; ☎/☎+49/331/294-003)

03-06: **7-a Montkabana Renkontiĝo de Aŭstra E-Junularo**, Werfen, Aŭstrio (AEJ, Pf 804, AT-8011 Graz; ☎h9250888@obelix.wu-wien.ac.at)

04-06: **12-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto**, Kozięłowy-Tuczno apud Poznań, Pollando (Paweł Janowczyk, ul. Zawady 2 m 7, PL-61-002 Poznań)

04-06: **Gaja E-ista Semajnfino**, As Vig, Danio (Lizzie Egholm, Vindingsvej 5, Stensballe, DK-8700 Horsens)

04-06: **Jarkunveno de Germana E-ista Fervojista Asocio**, Alexisbad, Germanio (Hans-Jürgen Riehn, Karlsbader Str. 89, DE-08335 Rittersgrün)

12-14: **3-a Aŭtuna Renkontiĝo**, Okemo, Vermonto, Usono (Normand Fleury, 6358 rue de Bordeaux, Montréal QC Kanado H2G 2R8; ☎normand.fleury@sympatico.ca)

26-02: **Seminario "Junularo sen limoj — agado por internacia interkompreniĝo"**, de TEJO kaj Skolta E-Ligo, Pollando (Jarosław A. Fotyga, ul. Harnasia 21/34, PL-20-857 Lublin; ☎+48/81/711-065; ☎upfotyga@klio.umcs.lublin.pl)

28-29: **Redaktado de Heroldo kaj Polaj literaturaj Nobel-premiitoj**, KCE, La Chaux-de-Fonds, Svislando (adreso supre; prelegas Ada Fighiera-Sikorska)

novembro

02-03 kaj 04-07: **2-a Internacia Kolokvo pri Interlingvistiko resp. Dua kurso pri interlingvistiko**, CDELI, La Chaux-de-Fonds, Svislando (d-ro Tazio Carlevaro, Viale Giuseppe Motta 32, CH-6500 Bellinzona; ☎+41/91/825-29-88; ☎825-95-59; temo: "Esplorkampoj de aplikita interlingvistiko" resp. "Fontoj kaj ĉefpunktoj de interlingvistiko")

08-10: **Seminario "Perado dum interkulturaj konfliktoj"**, Glienicke ĉe Berlino, Germanio (E-Junularo Brandenburg/Berlino, Berliner Str. 49, DE-14467 Potsdam, Germanio; ☎/☎+49/331/294-003; gvidas Elisabeth Schwarzer, Encarna Teruel Rodríguez, Siang Be)

09-11: **2-a Kolombia Kongreso**, Bogoto (Luis Jorge Santos-Morales, Apartado 89000, Bogotá)

15-17: **8-a Kongreso de Ĉeĥa E-Asocio**, Havířov, Ĉeĥio (ĈEA, p.k. 1069, CZ-111 21 Praha 1)

23-24: **Kio do estas lingvo**, KCE, La Chaux-de-Fonds, Svislando (adreso supre; prelegas Michel Duc Goninaz)

decembro

13-15: **48-a Kultura Semajnfino de Sarlanda E-Ligo**, Homburg, Germanio (SEL, Pf. 2019, DE-66470 Zweibrücken; prelegas Werner Bormann pri interlingvistiko, kursojn gvidas Silvia Moritz, Krešimir Barković, Ed Borsboom kaj Algis Kaspiravičius)

14-15: **Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI**, Zagrebo, Kroatio (Prof. Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb)

Kavalirino pro laboro porsocia

La nederlanda esperantistino Nora Moerbeek-Bartels transprenis de la urbestriko de Beverwijk, la 26-an de aprilo, la kvinan gradon de la ordeno Oranje-Nassau. Ĉi-okaze ni intervjuis la novan kavalirino.

Vi estas konata pro multflanka aktivado movada, precipe en Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). Ĉu la honorigo rilatas al tio?

Jes, oni oficiale motivis la aljuĝon per mia “multjara, esenca laboro en la Esperanto-movado nacia kaj internacia, ĉar Esperanto elstare servas por kunligi blindulojn”.

Ĉu vi atendis tiun distingon?

Ne, ĝis unu semajnon pli frue mi sciis nenion pri ĝi! Fakte, pri ĝia aljuĝo multan meriton havis Jan Verheule, kasisto de LIBE, kiu mem jam ricevis ĉi tian ordenon pro sia laboro por handikapuloj. La urbestriko diris sin impresita de la alfluo de leteroj diverslandaj kiuj subtenis mian kandidatecon. Samtempe kun mi, kvar aliaj personoj ricevis la ordenon, ĉiu pro sia volontula porsocia laboro.

De kiam Esperanto ĉeestas en via vivo?

Ekde mia infanaĝo, kiam mi aŭdis ĝin de miaj gepatroj. Mi lernis en blindula instituto de la urbo Bussum kiel internulino, sed la feriojn mi pasigis hejme. Mi aŭdas ankoraŭ kiel, ĉe enlitiĝo, miaj gepatroj diris en Esperanto: “Bonan nokton, filo kaj filino”, kaj ni respondis: “Bonan

nokton, patro kaj patrino”. Ĉar mi ĉiam estis legema kaj lernema, mi rapide kaj volonte lernis la lingvon helpe de brajla Esperanta vortaro. La unua libro kiun mi legis, estis *Dancu, marionetoj!* de Baghy. En la instituto instruis min la memorinda s-ro Roosdorp, kies fakoj estis stenografio, tajpado kaj Esperanto.



Foto: Francjo Veuthey

Kiel vi aktiviĝis en la movado?

Mia patrino — ankaŭ ŝi estis blinda — membris en Nederlanda Societo de Blindaj kaj Malforte Vidantaj Esperantistoj (NOSOBĖ), kaj en la ferioj mi iris kun ŝi al la NOSOBĖ-kunvenoj. En 1947 mi mem aliĝis kaj ekde tiam estas membro. En la 70-aj jaroj la gvidantoj de NOSOBĖ petis min estrariĝi, kaj mi baldaŭ fariĝis sekretario.

Mi ekstudis Esperanton en 1976, ĉe s-ino Middelkoop, la tiama docento pri Esperanto en la Universitato de Amsterdamo. Mia posta edzo, Rob Moerbeek, kuraĝigis min aliri la mez-nivelan, kaj poste, en 1981, la superan ekzamenon. Eĉ dum promenado li fraz-analizis kun mi...

(Rob Moerbeek: Mi gramatiklis ŝin!)

Internacie, mi aktiviĝis en 1983, kiel iom malgraŭvola kasisto de LIBE, kio mi restis dum ses jaroj. En 1992 mi fariĝis sekretario de LIBE kaj redaktoro de ties *Esperanta Ligilo*.

Vi ankaŭ tradukas, kiel atestas la sukcesa Anne Frank ne estas de hieraŭ (1988). Kia estas via labormetodo?

Mi legas la tradukotan libron per kasedoj, kaj poste brajle skribas la tradukon. Tamen, por ke Rob pli facile kontrolu, mi ĝin ankaŭ tajpas. Nun la afero pli facilas, ĉar mi havas komputilon, sed ne estis tiel en la tempo de *Anne Frank*, kiun mi ankaŭ legis al alilingvano — nome Osmo Buller, kiel finno — por kontrolo. Mia freŝa traduko same rilatas al Anne Frank: temas pri

sia kompleta, aŭtenta taglibro, kiu aperos ĉe Libroteko Tokio, en kompromise iom mallongigita versio laŭ freŝdata nederlanda eldono. Pretas krome nederlandigo de la romano *Sur kampo granita* de István Nemere, sed mi ne sukcesis ĝis nun trovi por ĝi eldoniston. Tamen, mi ŝatus traduki pluajn verkojn el Esperanto en la nederlandan kaj inverse. ★

27-03: 13-a Internacia Festivalo por mez-aĝuloj kaj junaj familioj, Würzburg, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Nidenstein; ☎+49/5624/8007; ✉5624/322)

27-03: 40-a Internacia Seminario de Germana E-Junularo, Freiburg i. Bresgau (Marc Stessgen, Hagedornstr. 6a, DE-51069 Köln; ☎/✉+49/221/685-597; ✉a2899426@hpw1.rz.uni-koeln.de; temo: “Regionoj — ĉu la veraj landoj?”)

29-02: Budapeŝta silvestro, Hungario (HEA, P.f. 193, HU-1368 Budapest)

30-02: Silvestra balo — vintraj ekskursoj, Poprad, Slovakio (Esperanto-Regiona

Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad, Slovakio; ☎+42/92/32-419)

1997

januaro

13-25: Aŭstralia E-Somerlernejo, Adelajdo, Aŭstralio (Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA 5069)

majo

10-13: Esperanta Kultura Festivalo, Aalen, Germanio (Esperanto-Stuttgart, Dachtlerstr. 21, DE-70499 Stuttgart)

10-17: 49-a Kongreso de Internacia Fervoj-

ista E-Federacio, Koŝice, Slovakio (Magdalena Feifčová, Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina)

16-19: 3-a Eŭrop-Unia E-Kongreso, Stuttgart, Germanio (Esperanto-Stuttgart, Dachtlerstr. 21, DE-70499 Stuttgart)

julio

19-26: 82-a Universala Kongreso de Esperanto, Adelajdo, Aŭstralio

1998

aŭgusto

01-08: 83-a Universala Kongreso de Esperanto, Montpeliero, Francio ★

Direktoroj atendas kunlaboron

Kvar monatojn post la elekto de la nova estraro, la Akademio de Esperanto kompletigis siajn rangojn elektante per sekreta voĉdono la direktorojn de la Sekcioj kaj Komisionoj.

Reektiĝis Rüdiger Eichholz pri Faka Vortaro, Bernard Golden pri Ĝenerala Vortaro, kaj Geraldo Mattos pri Prononcado. Georges Lagrange transprenis de Michel Duc Goninaz la gvidon de la Gramatika Sekcio, kaj Carlo Minnaja anstataŭas Baldur Ragnarsson kiel direktoro de la Literatura Sekcio. Krome, YAMASAKI Seikō respondecos pri Landaj Institutoj kaj Carl Støp-Bowitz pri Aprobo de Fakaj Terminaroj.

Pri la novaj direktoroj: Georges Lagrange estas fama verkisto kaj tradukisto, konata ankaŭ sub la pseŭdonimo Sergo Elgo. Li prezidas Societon Yvonne Martinot (la francan filion de Kooperativo de Literatura Foiro), kiu posedas kaj administras la kulturcentron La Kvinpetalo. Carlo Minnaja estas unu el la tre malmultaj denaskaj e-istoj en AdE. Literatura kritikisto kaj tradukisto, li ĵus aldonis

al siaj multaj meritoj la realigon de granda vortaro itala-Esperanta.

La Sekcioj estas volonte je dispono de la tuta esperantistaro por pritrakti demandojn kaj konsideri sugestojn. Kelkaj projektoj estas prilaborataj, interalie nova internacia publika kollokvo. Sed por esti efika, la laboro de la Akademio bezonas financan subtenon: societoj kaj privatuloj povas adresi sian helpon al la poŝtĉekkonto 23-20788-6 en Svislando, aŭ al la UEA-konto "akad-s", ambaŭ je la nomo de Akademio de Esperanto.

Laŭ gazetara komunikado de Perla Ari Martinelli Ĝenerala Sekretario de AdE

Ni starigis al la elektitaj estroj de Sekcioj kaj Komisionoj similajn demandojn kiel al la novaj estraranoj post ilia elekto (feb., p. 30-31): Kiajn taskojn plenumendajn vi vidas antaŭ vi kadre de via sekcio? Kion vi planas realigi? Jen la ĝisnunaj kvar reagoj:



Carlo Minnaja (Literaturo):

Unu el la taskoj kiujn mi vidas por la Literatura Sekcio estas la (kun)verkado de historio de la Esperantoliteraturo. La tasko estas tiel enorma ke multaj preferus pretervidi ĝin. La kolektado de ekzistantaj eseoj kaj aperintaj recenzoj povus esti bazo por tia verko. Inter la recenzoj ofte kaŝiĝas juveloj de kritika penetremo. Kompreneble por tia tasko necesas vasta kunlaboro ankaŭ ekster la Akademio; bedaŭrinde sin anoncis ĝis nun, por partopreno en la Literatura Sekcio,

nur tri personoj. Eble ĉi anonco kaŭzos interesigojn.



YAMASAKI Seikō (Landaj Institutoj):

Mi klopodos fortigi la interrilatojn de la Akademio kun UEA, ankaŭ kun landaj asocioj ĝenerale, kaj precipe kun lingvaj institucioj, ĉu ligitaj ĉu ne al la sialanda asocio — koncerne interalie ekzamenojn, kie oni limtuŝas ILEI. Por komenci, mi faros enketon por scii la faktojn. Mi atendas helpon de UEA en tio kaj alio.



Bernard Golden (Ĝenerala Vortaro):

Projektoj:

1. Sekcianoj ricevis la taskon decidi pri la plej ĝusta esperantigo de *euro*, *graffiti* kaj *Alsace/Elsass*. La opinioj estu prezentitaj ĝis la 31-a de julio. La rezultoj aperos en raporto, kiu povus fariĝi Sekcia Rezolucio.

2. Kunlaboro en la reviziado de PIV. Kiam mi proponis tiun taskon al la Akademio antaŭ pluraj jaroj, la tiama prezidanto Albault respondis ke PIV

estas propraĵo de SAT, do la Akademio ne havas rajton okupiĝi pri ĝi. Post kiam SAT petis helpon de ĉiuj esperantistoj por anoncita revizio de PIV, la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro neniam ricevis formalan inviton al aŭ instrukciojn pri partopreno.

3. Longdaŭra tasko: starigi principojn aŭ regulojn por asimilado de vortoj kaj propraj nomoj el diversaj etnolingvoj kun la celo eviti pli da kaoso.



Geraldo Mattos (Prononcado):

Kelkaj principoj devas gvidi la proponojn:

1. La devigoj truditaj de la Fundamento de Esperanto, cetere atencitaj de Waringhien kaj Kalocsay en ilia *PAG: klasika* prononcmannerio.

2. La bezono permesi kelkajn naturajn deflankigojn de la Fundamenta prononcado, kiuj estas fiziologiaj variantoj: *rekomendinda* prononcmannerio.

3. La ebleco toleri kelkajn deflankigojn, kiuj ne endanĝerigas la kompreneblecon: *akceptinda* prononcmannerio.

4. La neceso garantii la distingajn karakterojn de niaj parolsono: *evitindaj* prononcmannerioj.

LA STATO KAJ ESTONTECO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

Red. Petr Chrdle. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 191 p. 21 cm. Prelegaro de Akademia kollokvo (1994, Prago). Kontribuaĵoj de A. Albault, M. Bartovská, D. Blanke, W. Bormann, P. Chrdle, W.M.A. De Smet, M. Duc Goninaz, R. Eichholz, I. Jackson, J. Jackson, C. Kiselman, A. Krejčí-Lewanderska, K. H. Simon, J. Thierry, E. Urbanová. 27,60 gld.

SEMINARIO PRI LINGVOPOLITIKO

"Kio estas lingvopolitiko de la E-komunumo kaj ĉu ni bezonas ĝin?"

Rekte antaŭ la UK, sabaton la 20-an de julio, 9h30-15h00 en salono Hodler.

Influo

Por plibonigi la fluon de informoj pri informado



Numero 11



**Unue,
dankon
al ĉiuj kiuj
sendis al mi
komentojn
aŭ informojn**

**por ĉi tiu numero. Jen
ĉi-sekve mi proponas al
vi la plej freŝajn inform-
erojn kiuj atingis min;
se okazas aŭ, eĉ pli bone,
okazos io raportinda al
aktivuloj, nepre min in-
formu! Mi aparte ĝojas
aperigi artikolon de Ziko
M. Sikosek pri la ideo havi
komunajn informilojn, kiu
estas nepre konsiderinda.
Vidu ankaŭ la proponon
de Ian Fantom pri komuna
internacia novaĵbulteno.**

Geoffrey Greatrex

amaskomunikiloj

Francio: Televido

En decembro 1995 la franca privata ĉeno Canal+ dissendis unuminutan intervjuon kun Antoine Vonnet pri Esperanto dum la programo "C Net". En februaro la kvara kablaj ĉeno intervjuis tri junajn geesperantistojn dum 30 minutoj por la programo "Premières loges". (Antoine Vonnet)

Tutlanda televido raportis pri la nacia Muzeo de Esperanto (Gray), kiu en la aŭtuno festos sian 20-jariĝon. (Renée Triollet)

Komuna konsilaro pri informiloj

Ziko M. Sikosek

La aŭtoro, estrarano pri informado de Gemana E-Junularo, jam multe kontribuis al la informa kampo de la movado, plej videble per tre utila kaj sukcesa *Proponaro por la Esperanto-informado* (Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1995, 66p), pri ties enhavaj demandoj. UEA konstatas la gravecon de ĉi tia agado kaj la neceson kunordigi niajn strebojn, do dediĉos al ĝi kunsidon en Prago.

Se kredi al sufiĉe granda grupo de esperantistoj, informado pri Esperanto estas facila kaj simpla. Problemojn kaŭzas nur la kutima stulteco de la neesperantistoj, iliaj inercio kaj aroganteco. La mesaĝo de "nia misio" ja estas komprenebla kaj logika: La pola okulkuracisto L. L. Zamenhof inventis perfektan lingvon, lerneblan rapide kaj senpene. Ĉiuj homoj devas lerni ĉi tiun lingvon (aro da homamaj, pac-amaj kaj inteligentaj idealistoj jam faris tion), kaj poste ne plu okazos militoj.

Tiaj rakontoj, aŭ eroj el ili, svarmas tra Esperanto-informiloj en la tuta mondo. Tiam oni ne miru se "la bildo pri Esperanto [ĉe la publiko] estas fuŝita", kiel konstatis Ivo Durwael (*Esperanto*, jan. 1991, p. 7). Sed la Esperanto-informado suferas ankaŭ pro aliaj mankoj. Informtekstoj nacilingvaj aperas kelkfoje — tro ofte — en malĝusta lingvaĵo, ne ĉiam altkvalite kaj bonaspekte. Kvankam ekzistas relative multaj interesatoj en la mondo, nur malmultaj el ili ricevas informilojn, aliflanke homoj kiuj ne (tiom) interesiĝas pri Esperanto estas ĝenataj de malŝparitaj penoj. Ktp.

Ni povas plibonigi la situacion nur se la malfacileco de informado estas agnoskata. Informadistoj devas kolekti la spertojn kaj transdoni ilin. Vere necesas lernolibroj kiuj transformas penojn al sukcesoj. Ekz. UEA havas eldonserion "Konsilaroj por Aktivuloj". Mi mem laboradas pri libro kiu pritraktas la enhavon de nia informado. Aliaj aktivuloj verkas fotokopiajn konsilfoliarojn diverstemajn, kiuj bedaŭrinde ofte estas ne-esperantlingvaj, specifaj por iu asocio, kaj atingas nur relative malmultajn homojn.

Iu venonta "Manlibro por Esperanto-informado" devus — jen malformala propono — respondi al ĉi tiuj demandoj: ➔

Albanio: Ĵurnalo

Bardhyl Mezini tradukis en la albanan la artikolon "La perversaj efikoj de la nuna komunik-sistemo" de Claude Piron, kaj aperigis ĝin kun akompana artikolo en la ĵurnalo *Republika*. (Heroldo)

Mezini albanigis ankaŭ, el la Esperanta traduko, la monografion *La faŝismo* de la bulgara prezidento Ĵelju Ĵelev, kiu atendas eldonon, kaj *Sociopolitika, kultura, pedagogia kaj propedeŭtika valoro de Esperanto* de Symoens, de kiu cirkulas fotokopioj, enmanigitaj i.a. al direktoro pri mezlernejoj ĉe la edukministerio. (*Bulteno de la Albana LEI-sekcio*)

Belgio: Ĵurnalo

La plej granda franclingva ĵurnalo en Valonio, *Vers l' Avenir* (145 000 ekz.), informis sur unua paĝo pri la apero de la esperantlingva *Roma Meslibro*. (Heroldo)

Britio: Enketo

Laŭ komisiono de la komunikila kompanio Gestetner, oni lastatempe sondis la opiniojn de 800 lerneĵanoj pri Eŭropa Unio — raportis en junio la ĵurnalo *The Independent*. La respondoj ĝenerale estis nek favoraj nek inteligentaj: montriĝis, ekzemple, granda antaŭjuĝo kontraŭ Germanio. Duono de la infanoj taksis komunan lingvon necesa ➔

Redaktoro: Geoffrey Greatrex, The Highlands, Great Doward, Symonds Yat, Herefordshire, Britio HR9 6DY (provizora adreso); ✉ greatrex@aix1.uottawa.ca (restos valida). **Informa Fakto de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎ +31 10 436 1044; 📠 +31 10 436 1751; uea@inter.nl.net

☞ por la Unio, sed 87% el ĉi tiuj preferus la anglan. Tamen, rimarkinde, 6% subtenis la francan, kaj — sen iu ajn ekstera influo — 5% apogis Esperanton. (Mark Fettes)

Irano: Ĵurnalo

En tre populara matena ĵurnalo de Teherano, *Hamŝahri*, aperis la 6-an de majo longa artikolo pri Esperanto, kun la titolo "Internacia Lingvo". Ĝi citis pozitivan opinion de kubaj lingvistoj, laŭ la inform-agentejo *France Press*. (Jila Sedighi)

Britio: Radio

En la novjara tago William Auld partoprenis duonhoran, dufoje elsenditan programon de BBC Radio Scotland pri tradukado de skota poezio en diversajn lingvojn. "Pretekste" de Esperantaj Burns-tradukoj, eblis al li informi pri diversaj aspektoj de la Esperantaj lingvo kaj legantaro. (*La Brita Esperantisto*)

Germanio: Revuo

La aprila numero de *UNICUM*, la plej populara studenta magazino en Germanio (eldonkvanto: 333 000) enhavis preskaŭ dupaĝan, tre viglan artikolon kun la titolo "Esperanto estas *gajla* [= bonega]". Ĝi tre favore raportis kiel studentoj lernas Esperanton, kiel ili aplikas kaj ĝuas la lingvon. La artikolo aperis kun kolora foto pri Esperanto-aranĝo, kaj ne mankis informoj pri utiligo de Esperanto en la komputila reto. (Ulrich Matthias)

Katalunio: Televido


Pri la helpoprogramo de Kataluna E-Asocio al Bosnio (vd. apr., p. 67) kaj pri Esperanto informis Llibert Puig kaj Óscar Ariño dum 9 minutoj en matena programo de la kataluna televid-stacio TV3 la 13-an de majo.

Kroatio: Televido

Dum la monatoj januaro-aprilo Esperanto plurfoje aperis televide, ĉu kiel ĉeftemo de la elsendo ĉu menciita en nomo de asocio. Kiel ni jam raportis (marto, p. 58), la regiona studio de Varaždín realigis en januaro du programojn lige al la apero de *Tena*, nova libro de Spomenka Štítec. Sammonate teamo de la junulara televido vizitis la 40-jariĝantan Studentan E-Klubon de Zagrebo. En februaro Štítec, organizanto de ekspozicio pri ĉinaj paper-tranĉaĵoj, parolis en studio pri rilatoj de Esperanto kun la ĉina kulturo. Tutan aron da elsendoj en februaro provokis la buntaj aranĝoj de la programo "La mondo de geavoj kaj gelerantoj", kiun la homama sekcio de la E-klubo Bude Borjan lanĉis kadre de sia Unesko-agado. En marto aktorino Vida Jerman rakontis televide pri sia kariero, dum la nova volumo de la Esperanta Asteriks-serio inspiris televid-ĵurnalistojn al studia konversacio kun studentinoj Maja Tišljari kaj Ana Berc pri junularaj E-agadoj. En aprilo, je pasko, denove Bude Borjan ricevis du menciojn, lige al speciala programo por handikapitaj infanoj. (Spomenka Štítec, el *La eta gazeto*)

- ☞ — kio estas Esperanto, kaj kia estas ĝia parolantaro;
- kiujn el la rilataj faktoj ni prezentu kaj kiel;
 - kiel aspektu faldfolioj, broŝuroj kaj aliaj informiloj;
 - kiel kaj kie oni atingas interesatojn kaj disvastigas informilojn;
 - kiaj estas niaj celgrupoj;
 - kiel kontakti ĵurnalistojn;
 - kiel paroli kiam oni informadas aŭ varbas.

Grupo de fakuloj povus kunlabore kompili tian libron, kiu estus je dispono en la librejoj de Esperantaj asocioj kaj centroj, helpante al informademuloj. Estus ĝojige se baldaŭ troviĝus kunlaborantoj, kaj se la libro estus preta antaŭ la fino de tiu ĉi jardeko. Unu grupo planus la projekton, trovus verkontojn kaj (fin)redaktus ĉion. Alia grupo estus la verkantoj mem, ekz. Esperanto-aktivuloj kiuj jam okupiĝis pri publikaj rilatoj por granda Esperanto-renkontiĝo kaj kiuj ŝatus transdoni siajn spertojn. Tria grupo estus la plej neformala kaj granda, nome la provlegantoj kaj prinotantoj. Ĉu vi mem havas sciojn kaj spertojn por tia entrepreno? Tiam anoncu vian kunlaborem al Ziko M. Sikosek, Kampstrasse 75a, DE-45966 Gladbeck, Germanio.



Ziko M. Sikosek havas multajn proponojn por rompi la izolecon de E-aktivulo ...

Fiŝkapti ĵurnalistojn per eta kongreso

Ziko M. Sikosek

En Germanio okazas ĉiujare multaj internaciaj kunvenoj, kelkaj el ili kun dekmiloj da partoprenantoj aŭ eĉ cent mil. Ĉu kompare malgranda evento, kiel la Internacia Junulara Kongreso de 1996 (500 partoprenantoj) en la provinca turisma loko Güntersberge, "meze de nenio", povos altiri ĵurnalistojn el aliaj regionoj aŭ eĉ de tutlandaj gazetoj, radioj, televido? La ŝtatprezidanto Herzog ja estas la alta protektanto de la kongreso, sed li ne ĉeestos mem, malsame al pli grandaj eventoj kiuj povus altiri lin por alparoli kongresanojn.

Nia sola kialo esperi aŭskulton kaj rigardon estas la "ekzotikeco" de Esperanto. Tamen, en niaj publikaj rilatoj ni devas montri ankaŭ tion ke, kvankam Germana E-Junularo (GEJ) kaj TEJO estas ja asocioj iel specialaj (pro Esperanto), ili ne situas ekster la normala socio.

Jen nia praktika laboro: fine de majo cento da ĵurnalistoj, gazetoj, amaskomunikiloj ktp. en tuta Germanio ricevis informleteron ĝeneralan pri la evento. Kiel "pseŭdo-aktualaĵo" servis "la aliĝo de la 300-a partoprenonto". Fine de junio eliris "IJK-dokumentaro", maldika aktaro ses-paĝa: enkonduka letero, informoj pri GEJ, TEJO kaj IJK, paĝo pri la honora komitato (Herzog, Selten, Lee k.a.), adresoj, kontaktpersonoj, kaj superrigardo pri niaj surlokalaj aktivecoj publikaj. Cetere, taŭgaj fotoj por informado de GEJ estas daŭre serĉataj, kaj sendintoj kompreneble ricevos rekompencan.

Dum la kongreso, ĵurnalistoj rajtos veni kaj preni foliojn. Sed, pli grave, oni okazigos podian diskuton en la germana kaj Esperanto pri la temo: "Kunvivado en la komuna eŭropa domo". Diskutos invititaj reprezentantoj de junularaj organizoj neesperantistaj kaj esperantistaj, eble helpante nin atingi plian foton en gazeto aŭ filmsekundon en televido. Fine de la IJK forfaksiĝos la "aktualaj rezultoj" de la kongreso al elektita aro de amaskomunikiloj.

Por senti sin ano de Esperanto

Ian Fantom



Kiam mi pagis mian kotizon al mia nacia Esperanto-organizaĵo, iam diris novbakita esperantisto al mi, “mi supozis min ano de Esperanto — sed tute ne: oni devas rekotizi al UEA, kaj al la loka klubo, kaj...” Mi klarigis al li ke Esperanto estas ne nur unu organizaĵo, sed tutmonda socio; tute simple tiel ĝi evoluis. Tiu persono estas nun de longe aktiva laboranto por Esperanto je nacia kaj loka skaloj. Tamen, per tiu konversacio oni ekvidas iom la frustrigon de E-komencanto.

Alia komencanto diris al mi ke li opinias la Esperantajn eldonaĵojn amatoraj. Li komparis la nacian bultenon kun la bele ilustritaj magazinoj sur la bretoj de ĉiu gazetvendisto. Nur poste mi konstatis ke li verŝajne eĉ ne vidis internaciajn magazinojn kiel *Esperanto*, *Monato*, *El Popola Ĉinio*. Lia perspektivo estis limigita al la loka aŭ nacia organizaĵo.

Kion ricevas homoj kiel li — granda plimulto de la monda esperantistaro — kontraŭ la kotizo pagita al nacia E-organizaĵo? Tio dependas de la lando. Tamen, ĝenerale temas pri nacia bulteno kiu enhavas literaturon verkitan de samlingvanoj por samlingvanoj; novaĵojn lokajn kaj naciajn; internaciajn novaĵojn pri Esperanto, kutime en la loka lingvo; helpilojn por komencantoj kaj progresantoj. Ĉu tio sufiĉas por doni al la ricevantoj tutmondan perspektivon?

Legi artikolojn verkitajn de samlingvano ŝajnas nur intelekta ludo, ne vere aŭtentika uzo de Esperanto. Novaĵoj lokaj kaj naciaj estas necesaj, se oni deziras agi por subteni Esperanton, sed ankaŭ ili ne kondukas la leganton al aŭtentika uzo de la lingvo. Internaciaj novaĵoj helpas doni pli vastan perspektivon, sed se ili presigaĵas en la loka lingvo, la leganto ne sentas ke li senpere atingas tiun vastan mondon. Lingva helpo ja estas utila por lernantoj, sed por kio ĝi preparas ilin?

Tio similas al lerneja sistemo kiu edukas la lernantojn kun la supozo ke ili iros al universitato, dum fakte malplimulto faros tion. Ni edukas niajn esperantistojn supozante ke ili aliĝos al internacia organizaĵo, dum la plimulto fakte restos anoj nur de la nacia asocio. Plue, ĝuste la periferiajn anojn — kiuj eble restos en la movado venontjare, eble ne — ni devas plej multe flegi.

Tio signifas ke ili devas senti sin “anoj de Esperanto” ekde la komenco, jam pro sia aneco en la landa E-asocio. Ili devas esti senpere en kontakto kun la mondo, uzante Esperanton. Necesas trovi solvon por tio, sen plialtigi la kotizojn.

La solvo estas principe simpla. Anstataŭ traduki la internaciajn novaĵojn en amason da naciaj lingvoj, oni eldonu unu profesi-nivele produktitan novaĵbultenon



La LKK-ano pri publikaj rilatoj (PR) laboras honorofice kaj sub la malplifaciliganta kondiĉo vivi en eksterlando. Bonŝance, multan praktikan laboron transprenas la laŭdinda GEJ-oficejo en Berlino. Ĉar PR bezonas la kunlaboron de (preskaŭ) la tuta LKK, dum la renkontiĝo funkcios surloka teamo por tiu celo. Indas noti ke ni havas “lingvopolitikan liston” por “reguligi” nian lingvaĵon. Neesperantistoj tre konfuziĝos se ili aŭdos de diversaj — aŭ eĉ de la samaj — LKK-anoj ĉiufufo malsaman tradukon de E-terminoj, kiel IJK: “Internationaler Jugendkongress”, “Weltjugendkongress”, “Jugendweltkongress”, “Internationaler Jugendweltkongress”, aŭ “I-jo-ko” (anstataŭ prononci la mallongigon germane, “i-jot-ka”). Germana proverbo diras: “La diablo sin kaŝas en detalo”...

Kion ni atendu de la IJK-PR? Nek la finan venkon nek duobligon de nia membronombro. Jes, ni havos en la IJK kurson por komencantoj kaj enkondukajn lecionojn por unutagaj vizitantoj, kaj ni provos disvastigi nian Berlinan adreson tiom bone kiom eble. Tamen, la plej grava efiko estos ke homoj *denove aŭdos pri Esperanto*. Tio kreos en ili pli pozitivan bildon, kaj eble plifaciligos postan decidon eklerni tiun lingvon.

 **aplikado**

TTT-paĝoj

Pluraj landoj, ĉefe en Nord-Ameriko kaj Okcidenta Eŭropo, akiris Esperanta(j)n paĝo(j)n en la Tut-Tera Teksaĵo. Ofte temas pri paĝo de la junulara sekcio (kiel en Germanio kaj Italio), kaj ne malofte ankaŭ lokaj grupoj havas siajn proprajn “ejojn”. Iuj asocioj evidente celas informi ĝeneralan publikon (ekz. la islanda asocio, kiu klarigas pri Esperanto en la islanda), dum aliaj celas samideanojn (ekz. la itala junularo), kaj iuj plenumas la du funkciojn samtempe (ekz. la imponaj svedaj paĝoj dulingvaj). Diversaj ligitvortoj kreas utilajn ligojn inter la paĝoj. Bona enirejo al la riĉaĵoj alireblaj per la reto estas la indekso de Martin Weichert, ĉe: <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/veb/>. Cetere, inter la paĝoj de landaj asocioj la plej neatendita estas eble tiu de la itala junularo pri la aktorino Sandra Bullock, kun fotoj kaj kun ŝia biografio en Esperanto.

 **rimedo/materialoj**

Germanio

Germana Esperanto-Junularo (Chausseestr. 8, DE-10115 Berlin) informas sur du simplaj, germanlingvaj faldfolioj pri la Internacia Seminario de GEJ, kaj pri aranĝoj, periodaĵoj ks. rekomendindaj por komencantoj. Ziko M. Sikosek cetere kunmetis, germanlingve, “12 demandojn kaj respondojn pri Esperanto”.

Japanio

Japanlingva konciza informilo (B4-formata, du-flanka) “Esperanto, la lingvo por la tuta homaro” estas preta. Krom doni bazajn sciojn pri la lingvo, ĝi utile informas pri libroj kaj organizaĵoj en la lando. E-societo en Numazu (Okaisiki 501, Numazu, 410 Japanio; ☎/☎ +81/559/223-783; ✉hjp24795@pcvsn.or.jp) pretas sendi unu ekzempleron kontraŭ du respondkuponoj, por libera fotokopiado kaj laŭplaĉa utiligo.

Nederlando/Germanio

Jam ekde kelka tempo Nederlanda kaj Germana E-Junularoj en bona kunlaboro interŝanĝas siajn informilojn por adapto en la alia lando. NEJ jam transprenis “Tiom facilas Esperanto” kaj faris el ĝi nederlandlingvan faldfolion; nun GEJ uzas tiun de la flandraj kaj nederlandaj gejunuloj pri Pasporta Servo.

Per tiaj interŝanĝoj oni povas ŝpari multe da laboro. Cetere la informinterŝanĝo ĝenerale estas bona kaj kleriga; mi bonvenigus modelojn el aliaj landoj.

*Ĉiuj veraj esperantistoj
abonas al la plej ofta E-gazeto*

EVENTOJ

Ĉu ankaŭ vi?

pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario

Belgio

Dank' al helpo de pluraj E-klubo kaj individuaj donacoj, grupanoj de La Progreso (Gento) povis ĉeesti kun informbudo la flandrian "eduk-borson" EDUCA: dum kvar tagoj ili informis centojn da pedagogoj. Didaktika panel-ludo elektra de Skolta E-Ligo, jam uzita en la Monda Jamboreo de skoltoj (okt. '95, p. 169), allogis la rigardojn. Ankaŭ edukministro Luc Van den Bossche haltis minuton por studi la konjugacion de Esperantaj verboj. Konkludo de la klubanoj: en EDUCA ili povis aliri publikon kiu, pro intereso profesia, tre bone povas uzi kaj transdoni informojn pri Esperanto. Ofte aŭdiĝis la reago: "Fine ni trovas iom pli da informoj pri Esperanto!" (*Horizontaal*)

Ĉinio

La 9-an de marto petrol-rafinejo en la urbo Fushun okazigis Junularan Volontulan Servan Tagon. Wu Guojiang, delegito de UEA kaj TEJO, invitis partoprenis per konsulto pri Esperanto. Li respondis al demandoj de pli ol 60 personoj el universitatoj, mezaj kaj elementaj lernejoj, entreprenoj kaj fabrikoj. (Wu Guojiang)

Francio

De la 11-a ĝis la 15-a de aprilo staris E-budo en la ekspozicio "Vivi kaj labori alimaniere" (Parizo), vizitata de pluraj centoj. Oni kolektis pli ol 200 adresojn de interesatoj. (*SAT-Amikaro*)

Katalunio

De multaj jaroj Centro Esperanto de Sabadell partoprenas en la loka librotago, la 23-an de aprilo. Loka ŝparkaso disponigas senpagajn budojn al kulturaj asocioj en sia urbocentra ĝardeno. Jen (dekstre) pluraj esperantistaj generacioj ĉe la ĉi-jara budo. (Kataluna E-Asocio)

➔ en Esperanto, verkita en simpla lingvaĵo, kiun eĉ komencantoj komprenus (aŭ bonvenigus kiel aktualan studmaterialon). Oni povus argumenti ke tion jam faras *Heroldo* kaj *Eventoj*, certgrade *Esperanto*; sed kion oni bezonas estas io tre konciza, mallonga kaj malmultekosta. Ĝi ja ne konkurencus kun la menciitaj revuoj; tute male, ĝi tenus la intereson de periferiaj esperantistoj, tiel ke pliaj el ili fariĝus esperantistoj kernaj, kiuj abonas internaciajn revuojn kaj aliĝas al tutmondaj organizaĵoj. La nova bulteno povus esti pogrande sendata de la eldonanto al la naciaj asocioj, kiuj distribuus ĝin aldonante al siaj kutimaj ekspedaĵoj.

Se kalkuli laŭ la Jarlibro de UEA, la suma membronombro de ĉiuj landaj asocioj estas iom pli ol 27 000. Aldono de la 5577 kolektivaj anoj donas rondcifera sumon de 33 000. Tia eldonkvanto estus trarompo en la Esperanta eldonado.

Kia devus esti tiu bulteno? Sur bona papero (kiel tiu de *Esperanto*), ĝi ampleksus 2-4 A4-paĝojn, kaj aperus monate aŭ dumonate. Ĝi estu plenpakita per internaciaj novaĵoj movadaj kaj per faktoj. Verkita en simpla lingvaĵo, ĝi interesus kaj lernantojn kaj spertulon. La redakcio devas esti loko tra kiu jam fluas multaj E-novaĵoj: evidentaj kandidatoj estas la redaktejoj de *Esperanto*, *Heroldo* kaj *Eventoj*. La agadon povus preni sur sin UEA, aŭ komerca entrepreno ekster ĝi. En ambaŭ kazoj UEA ludus gravan rolon en la merkato, ĉefe en la influado de la landaj asocioj.

Eldonkvanto de 33 000 estas respektinde granda. Oni verŝajne povus altiri reklamojn de internaciaj kompanioj, kio donus monon kaj prestiĝon. Por la unua fojo internaci-skala agado forte impulsus la antaŭenigon de Esperanto je loka kaj nacia niveloj. Mi proponas kiel nomon por la nova eldonaĵo: *Esperanto Hodiaŭ*. Kiu deziras alpreni la ideon?



Pluraj E-generacioj informis ĉe senpaga budo en Sabadell (Katalunio).

Foto: Gloria Torres

Pretigu vin por Ago-Tago!

Ĉiujare, pli kaj pli da aktivuloj en pli kaj pli da landoj organizas publikan prezenton de Esperanto en la internacia Ago-Tago: ĉi-jare, sabaton la 5-a de oktobro.

Eblas ĉio, laŭ lokaj kondiĉoj kaj prioritatoj: surstrata stando, publika manifestacio, biblioteka ekspozicio, disdonado de flugfolioj (ekzemple por varbi partoprenantojn de la jarfinaj kursoj), urba proklamo, radio- kaj televid-intervuoj ktp ktp. Ekzemplojn de sukcesa agado vi trovos en la raportoj pri pli fruaj Ago-Tagoj (dec. '95, p. 201).


Pasintjare UEA rekomendis ke la agadoj menciu la datrevenon de Unuiĝintaj Nacioj kaj la ligon inter lingvo internacia kaj monda demokratio. Ĉi-jare, en la Internacia Jaro de la Batalo Kontraŭ Malriĉeco, indas substreki la grandan investon kiun postulas la lernado de fremdaj lingvoj, kaj prezenti Esperanton kiel lingvon lerneblan de ĉiuj, por doni al homoj malriĉaj kaj senpotencaj efikan, altkvalitan komunikadon trans kulturajn barojn.

La landaj asocioj prefere antaŭsciigu unu la alian kaj la Informan Fakon pri siaj planoj, ĉar la samtempeco en diversaj landoj estas ĝuste unu el la eblaj interesaĵoj por la amas-komunikiloj. Tiuj kiuj ĝis la 16-a de septembro liveros la planon de sia agado al la Informa Fakto de UEA, antaŭ la fino de la monato ricevos superrigardon pri ĉiuj anoncitaj agadoj.

kulturo

Enciklopedio

Les langues de l'humanité ("La lingvoj de la homaro") de Michel Malherbe, 1734-paĝa enciklopedio pri 3000 lingvoj parolataj en la mondo, eldonita en la populara serio "Bouquins", dediĉas 9 paĝojn al Esperanto, sen misprezento aŭ subtakso. Tamen, "la konkludo ŝajnas al ni esperantistoj iom... dubinda", skribas recenzanto Hervé Gonin en *Franca Esperantisto*: laŭ Malherbe, "eble la principo mem de Esperanto implicas malsufiĉan analizon pri la bezonoj de komunikado: maloftas la kazoj kiam oni devas esprimi sin samtempe kun homoj kiuj parolas multajn lingvojn malsamajn."



Tra lupeo filozofa kaj lingvista


La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo (1993). Umberto Eco (1932). El la itala trad. Daniele Mistretta. Pisa: Edistudio, 1996. 317p. 21cm. 36,00 gld.

La abunda verkaro de Umberto Eco havis dum preskaŭ dudek jaroj negrandan eĥon, malgraŭ la pinta klarvideco de liaj enketoj pri la konsumsocio, studoj pri la amas-komunikiloj, kritikoj pri la avangardaj poetoj. Abrupte grandegan tutmondan renomon li gajnis en 1980 per la romano *La nomo de la rozo*, kiu donis reflektan famon ankaŭ al liaj pli fruaj verkoj, kaj al kelkaj postaj, kiuj eĉ antaŭ la apero fariĝis furorlibroj.

La recenzata verko same guas la jam establitajn famon de sia aŭtoro, sed estus mem inda alporti famon aŭtonoman. Temas pri tre klera studo pri la klopodoj, dum la jarcentoj, aliri perfektan idiomon kiu neniigu la lingvan Babelon. Ne ĉiuj esperantistoj plene konscias pri la tuta longa vico de lingvaj provoj kiuj aspiris solvi la problemon de neinterkompreniĝo. Tiurilate interesos scii kiom ofte la hebrea estis respurata kiel la origina, praa, perfekta lingvo, kiun Dio parolis kun Adamo, kaj kiun la malbonaj homoj perdis pro puno. Kiam *Genezo* 1 raportas pri la frazo dirita de Dio, "Estu lumo", stariĝas la problemo pri la prakomenco de lingvo; tio tamen ne havas sencon, ĉar lingvo estas lingvo nur se jam ekzistas du pensantaj estaĵoj kiuj per ĝi interŝanĝas siajn pensojn. Kaj, ankoraŭ, *Genezo* 10 kaj *Genezo* 11 kontrastas inter si pri la unueco aŭ diverseco de lingvoj.

Kaj plue, kiom ofte la supozo ke ekzistas iu universala logiko, faranta ĉiujn homojn homoj, do baze egalaj

unu al la alia, produktis la rezulton de lingvoj aprioraj, bazitaj sur logiko, sur kalkulado, sur kombinatoriko! Tra-sulki la historion de ĉi serĉado de la perfekta lingvo estas esplori la celadon al unueco de la homaro, al ĝia identigo disde la aliaj vivantaj specioj.



Laŭ Mercurius van Helmont (1667), la hebrea estas la lingvo kies sonoj estas plej facile produktaj de la homaj voĉ-organoj. (El *Alphabeti veri naturalis Hebraici brevissima delineatio*, reproduktita en la libro)

Historio fascina, eble pli en siaj malsukcesoj ol en siaj sukcesoj; kaj Eco pilotas la ŝipon de tia esplorado ne nur kun majstreco sed ankaŭ kun humuro, malofta trajto en sciencaj verkoj. La libro ne ridindigas provojn aŭ eksperimentojn de internaciaj lingvoj: ili ĉiuj kontribuis sian ŝtoneton al la granda celo de ĝenerala interkompreniĝo. Rigardante la strebon al internacia lingvo kiel esence pozitivan, Eco ne povis pretervidi la ideologian, filozofian, emocian flankon de la verko de Zamenhof, al kiu estas dediĉita deko da paĝoj entute: malmulte se oni devus trastudi Esperanton, multe se

kompare kun la dumiljara historio pritraktita. Tra la lupeo de la filozofo, la interna ideo estas ĝuste vidata pozitive, kiel la savilo de la lingvo el iompostioma forgesado — sorto kiun suferis ĉiuj antaŭaj (kaj postaj) klopodoj samspecaj —; rigardinte tra la lupeo de la lingvisto, Eco asertas ke Esperanto estas bone konstruita lingvo, kiu do ne fiaskos el lingvistikaj kaŭzoj. Tute prave li insistas ke la akcepto de internacia lingvo estas demando politika, ja ne lingvistika aŭ sociologia. Li refutas per solidaj argumentoj kelkajn ŝablonaĵojn kontraŭ la ebleco kaj dezirindeco de internacia helplingvo neetna.

La aŭtoro estis malvarma rilate al Esperanto, kiel la plimulto de la italaj sciencistoj; tamen, dum la esploroj por tra la verkado de ĉi libro, li alprenis tute pozitive interesitan sintenon, tiel ke

en ĉi lastaj jaroj li plurfoje publike deklaris sian konfidon pri la transprenindeco de Esperanto kiel internacia komunikilo.

Ĉi verko, en la itala, estas konsilata teksto en la universitato de Torino en la kurso pri interlingvistiko kaj esperantologio. Se oni trovu malfortan punkton: ĝi eble tro amplekse liveras citaĵojn diverslingvaj, donante impreson pri grandega klereco, kiun Eco certe havas, sed la ĝenerala publiko, al kiu la libro estas adresita, malfacile kapablas distingi inter citaĵo de grava pensulo kaj tiu de obskura paŭsisto, precipe se sortimentitaj el la mezepoko aŭ el la renesanco.

La antaŭparolo de Humphrey Tonkin vidas paralelon inter cionismo kaj esperantismo, ĉar ja al la hebrea multaj okcidentaj pensuloj atribuis la rolon de praa intergenta idiom. Se tia paralelo povas esti konsiderata, unuapage, nur lirika apudigo, la legado de la libro donas al ĝi tamen forton.

La traduko de Daniele Mistretta devis fronti plurtipajn malfacilaĵojn, de la teknikaj terminoj ĝis la elegantaj esprimoj de la aŭtoro. Tiujn problemojn li majstre solvis, eĉ ie-tie ĝustigante citaĵojn en Esperanto kiuj malperfektis en la itala originalo.

Carlo Minnaja (Italia)

Quo vadis, lingvo latina?

La latina kiel interlingvo. Latein als internationale Sprache.

Věra Barandovská-Frank. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 191 p. 21cm. Esperantlingva, kun ampleksaj germanaj resumo. 23,10 gld.

En interlingvistiko mankis ĝis nun kompleta trakto pri la latina lingvo kiel valora objekto konsiderinda sub ĉiuj aspektoj de internacia helplingvo. Nur sporadaj prelegoj kaj laboraĵoj — en la latina kaj Esperanto — traktis unuopajn temojn. Ĉi tiu libro plenigas feliĉe tiun mankon, kaj, post enfokusigo de ne nur lingvistikaj profiloj de la temo kaj elbobenigo de sennombraj nocioj, ĝi metas la leganton antaŭ la demando: kien iras (*quo vadit*) la lingvo internacia?

La verko malfermiĝas per historia ekskurso pri la lingvoj ĝuintaj, antaŭ la latina, la statuson de lingvo internacia. La dua parto pritraktas la rolon de la latina tra la historio, ekde ĝia statuso kiel unuiganta faktoro de la romia imperio ĝis ĝia funkciado kiel humanisma intelektuala lingvo (1300-1700). Ĉi tiun parton oni legas kiel romanon, ĉar la aŭtoro eĉ ŝerceme intermetas ekzemplojn de

“Latino macaronico”, frandaĵojn por amantoj de ne tro katedra latino. Pravigebla estas ĉi-loke la reliefigo de la unuaj interlingvistikaj aĵoj kaj de la doktrino de Komenio.

En la tria parto Barandovská-Frank analizas ĉiujn agad-formojn per kiuj oni nuntempe klopodas vivteni aŭ relanĉi la latinan. Ĉio prave donas la impreson de lingvo ne mortinta, sed tre viva en certaj kulturaj medioj, kapabla esprimi la realon de ŝanĝiĝanta mondo. Kvare, la aŭtoro traktas la latinan kiel planlingvan fonton. Specimenoj el Andersena fabelo en la latina, Latino sine flexione, Interlingua, Occidental, Novial, Ido kaj Esperanto impresas kiel tekstoj en dialektoj ne tro distancaj. El kompara prijuĝo de tiuj planlingvoj sur la bazo de 36 kriterioj rezultas: plej taŭgas kiel interlingvoj, vicorde, Esperanto kaj la latina. Tio ne tute konvinkas, ĉar estas facile falsi la

ĵetkubojn por atingi celitan pravigon. Temas tamen pri ŝatinda, perfektigebla provo.

Laste, la aŭtoro pritraktas la estontecon de la latina. Ŝi konkludas ke ĝi havas malpli grandan ŝancon por firmiĝi en la uzo ol iu latinida planlingvo. Kun tia vidpunkto mi konkordas — tamen nur kun la senpia aldonado ke la ŝanco de la latina estas nula ekster la intelektularo. La klasikan latinan la homaro ne parolos. Cetere, se la latina estas gemo akirita post longa historia sperto kaj ellaborado, ĉu sencas paroli ĝin al mallertuloj?

La libro, frukto de atentaj kaj penaj serĉadoj, estas rekomendebla por studemaj legantoj. Kelkaj diskutindaĵoj kaj senkritike akceptataj rekantaĵoj (ekz. ke Esperanto trairis normalan lingvan evoluon) nenion forfrotas el la kerna valideco de la verko. Bedaŭrindas la manko de latinlingva resumo, kiu estus povinta legigi la verkon al novlatinistoj, emaj ignori aŭ malestimi Esperanton. La aŭtoro meritas plenan aprobon, *maxima cum laude*.

Janus Di Censo (Italio)

Unua paŝo al komuna historio

Historio de Japanio kaj Koreio: Enkonduko. KUBOI Norio (1942).

El la japana trad. kaj eld. Esperanto-grupo por komuna lernolibro pri historio. Oosaka, 1995. 12+124+44p. 26cm. 30,00 gld.

Miskompreno ofte havas historian fonon. Junaj japanoj kiuj cerbumis kiel forigi inter siaj samlandanoj antaŭjuĝojn pri la aziaj najbaroj, tial decidis prizorgi komunan lernolibron pri historio. Ili elektis japanlingvan enkondukon en la historion de Japanio kaj Koreio kaj, kunlabore kun koreoj, prenis sur sin la taskon traduki ĝin en Esperanton.

La libro, teknike alloge aranĝita, inkluzivas multajn ilustraĵojn kaj indeksojn. Enhave ĝi iom similas enciklopedion, ĉar prezentiĝas, eĉ se nur skize, multaj faktoj pri la historio de Koreio, kun aparta prefero al ĝiaj rilatoj kun Japanio. Pli ol duono de la enhavo estas dediĉita al la koreaj-japanaj rilatoj ekde la ĉina-japana milito de 1894-95, kiu markis la aliĝon de Japanio al la imperiismaj potencoj. Imitante la Okcidenton,

Japanio en 1910 aneksis Koreion kaj dum 35 jaroj traktis la duoninsulon kiel kolonion. Eĉ nun, 50 jarojn post




“Tombo de oreloj” en Kioto: la japana armeestro Hidejoŝi igis sian armeon sendi orelojn aŭ nazojn de koreoj.

la militfino, koreoj ne povas forgesi tiun subpreman periodon, dum multaj japanoj des pli emas ĝin forgesigi.

Ĉiam ekzistis ankaŭ japanoj kiuj hontis pri la forgesigemo kaj ignoro rilate japanajn krimojn kontraŭ koreoj. Al tiuj kiuj sincere alfrontis la historion kaj avangarde laboris por novaj, egalrajtaj rilatoj inter la homoj de la du landoj, frue apartenis la esperantistoj. Jam ekde 1982 okazas komunaj seminarioj de junaj esperantistoj el Koreio kaj Japanio, el kies intensaj diskutoj rezultis ankaŭ tiu ĉi libro. Ĝi neeviteble ne povas kontentigi ĉiurilate. Ekzemple, tute mankas ia klarigo pri la estiĝo de la korea milito (1950-53). Neniel akceptebla estas la esprimo “Aŭŝvic en Japanio”, kiu, provante karakterizi la krue lan trakton kiun suferis koreaj karbministoj en Japanio, neintence bagateligas la nazian amasmurdadon de judoj. Tamen, gravas la iniciato. La eldonantoj mem nomas ĝin “unua paŝo” kaj anoncas la preparon de “espereble pli kompleta, neŭtrale objektiva, kaj justa historio inter du najbaraj landoj intime ligitaj tra la epokoj”.

Ulrich Lins (Germanio)

Laste aperis



Bibliografio de tradukoj el la angla lingvo. William Auld (1924) kaj Edmund Grimley Evans (1966). Dollar: W. Auld, 1996. 53p. 30cm. Laŭintence kompleta listo, ĝis 1996, de beletraj esperantigoj el la angla, plus el alilingvaj literaturoj de Britio kaj Irlando. 10,80 gld.

Blanka malsano, La. Triakta dramo en 14 bildoj (1937). Karel Čapek (1890-1938). El la ĉeĥa trad. Theodor Kilian. Třebíč: E-klubo de Theodor Kilian, 1994 (2-a eld.). 100p. 21cm. Potenca averto kontraŭ totalismo. Ĉi tiu traduko (1938) servis por japanigo de la dramo. 15,00 gld.

Esperanta-serba kaj serba-Esperanta vortaro. Reĉnik Esperanto-srpski i srpsko-esperantski. Stevo M. Rađenović, Miodrag D. Kocić. Beograd: Finansijski Vodič, 1995. 60+63p. 15cm. Kun ĉ. po 2000 vortoj. 9,60 gld.

Esperanto, lingvo planebla. Umberto Broccatelli (1931). Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1996. 20p. 30cm. Esploro de sep lingvaj problemkampoj en Esperanto kaj propono de solvoj per starigo de konvencioj ne kontrastaj sed paralelaj al la ordinaraj reguloj. 12,00 gld.

Granda Thúry György, La. Sándor Takáts. El la hungara trad. István Takács. Nagykanizsa: Tibor Szabadi, 1996. 99p. ISBN 963-650-171-8. 21cm. Epizodoj el la epoko de la turka okupado de Hungario (16-17. jc.). 16,80 gld.

Infanoj en la arboj, La. Gudrun Pausewang (1928). Kun ilustraĵoj de Inge Steineke. El la germana trad. Nora Caragea. Maribor: Inter-kulturo, 1995. 62p. ISBN 961-6075-10-1. 20cm. Bind. Infanoj per kuraĝa ideo malhelpas la planon de teren-posedanto kiu volas forbruligi arbaron. 19,80 gld.

Katarismo kaj naskiĝo de Inkvizicio. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1996. 35p. ISBN 2-906134-31-7. 21cm. Prezento de hereza religia movado de la 12-a/13-a jc. en Francio, de ties persekutado, kaj de la originoj de la Inkvizicio. 9,90 gld.

Kvarteto. Viktor Ĉaldajev (1945), Gafur Gazizi (1958), Nikolai Lozgačev (1957), Alen Kris (1955). Antaŭparolo de W. Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1996. 78p. 20cm. Internacia prezentiĝo de tri rusaj kaj unu baŝkira poetoj, debutintaj en la 80-aj jaroj en la almanako *Sezonoj*. 12,00 gld.


Lasta reveno / Letzte Wiederkehr. Rose Ausländer (1901-88). Grafikaĵoj de Rita Rössler-Buckel. Dulingva. El la germana trad. Franz-Georg Rössler. Dudenhofen: Ponto, 1994. 79p. ISBN 3-9803793-2-9. 21cm. Mallongaj poemoj de unu el la plej gravaj germanlingvaj poetinoj de la 20-a jc., de kiu jam legeblas en Esperanto *Momentoj el eterno* (1989). 15,00 gld.

Mariamne (1967). Pär Lagerkvist (1891-1974). El la sveda trad. Bertil Nilsson. Skövde: Al-fab-et-o, 1995. 56p. 21cm. La lasta, kvintesenca romano de sveda Nobel-premiito, kun simpla sed alte beletra lingvaĵo. 10,50 gld.

Marta aŭ La bazaro en Richmond (1847). Friedrich von Flotow (1812-83). El la germana trad. Wolfgang Loose. Ehrenburg: Kalte Zeit Verlag, 1994. 63p. ISBN 3-927123-02-1. 15cm. Libreto de romantika komika opero. 7,80 gld.

Meĉunarodni jezik Esperanto / La internacia lingvo. Udžbenik / Lernolibro. Miodrag Kocić (1931). Beograd: la aŭtoro, 1996. 94p. 25cm. Baza lernolibro por serblingvanoj. 13,50 gld.

Mia muso / Meine Maus. Ein Mäuseleben in Bildern und Gedichten. Franz-Georg



La plej belsona kaj (dekstre) la plej belaspekta libroj de la monato.

Rössler (1949) kaj Rita Rössler-Buckel (1949). Dulingva. Kaiserslautern: Strasser Verlag, 1991. 47p. ISBN 3-8717-162-0. 20cm. Aventuroj poeziaj kaj grafikaj de tute persona muso de la aŭtoro. 15,00 gld.

Panoramo de la novaj aŭ universalaj alfabeto kaj ortografio por la Zamenhofa lingvo. Jon Walter Yung (1937-91), kun la helpo de C. Pradelet kaj Y. Gicquel. Tuluza: AEIOU, 1995. 336p. 21cm. Propono ŝanĝi la ortografion de Esperanto. 39,00 gld.

Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO, 1996/97. Rotterdam: TEJO, 1996. 128p. 21cm. Mapoj. Nova eldono, kun 784 adresoj en 68 landoj. 24,00 gld.

Per konstrui una lingua. L'interlinguistica tra autonomia e neolatinismo. Tazio Carlevaro (1945). Bellinzona: Hans Dubois, 1995 (2-a, reviziita kaj ampleksigita eld.). 162p. 21cm. Itallingva. Konciza historio de la naturalisma skolo de lingvoplanado. 27,00 gld.

Pri Sankta Dominiko/Dominikus. Leben und Werk. Helga Joerger / Franz-Georg Rössler. Dulingva. El la germana trad. F.-G. Rössler. Messkirch: Armin Gmeiner, 1988. 28p. ISBN 3-926633-13-1. 21cm. Pri la fondinto de la dominikana ordeno. 9,90 gld.

Retoromanĉa, La. Historio kaj nuntempo de la kvara nacia lingvo de Svislando. Arthur Baur (1915). Bellinzona: Hans Dubois, 1995 (3-a eld. aktualigita kaj ampleksigita). 90p. 25cm. 21,00 gld.

Vocabolario italiano-esperanto. Carlo Minnaja (1940). Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1996. 1438p. ISBN 88-85872-05-0. 22cm. Bind. Antaŭparolo de Joshua Fishman. La ĝis nun plej granda nacilingva-Esperanta vortaro, taŭga ankaŭ por studentoj de la itala. Kun tre detala distingo de signifoj, grandnombraj esprimoj kaj sintagmoj. 120,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Kasedo:

Rememoru kun bruna ŝtono. Mikaelo Bronŝtejn (1949). Stokholmo: Pigo-Studio, 1992. Koncerta surbendigo de 13 kantoj kaj



3 poemoj, kun gitara akompano kaj spritaj komentoj pri la E-movado en la iama Sovetunio. 18,00 gld.

Komputila programo:

Ĉapeliĉo 2.0. PEJNO Simono (1941). Kun manlibro. Pure Esperanta tekstprilaborilo por Vindozo 3.X kaj '95 sur IBM-kongruaj kaj japanaj NEC-aj personaj komputiloj. Kun E-literumilo, E-dividilo, 70 E-tiparoj, proverbaro kaj 3 ludoj. 264,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



For la Esperantan sektismon!



1. Sektoj

La Esperanto-movado estas sufiĉe heterogena, kaj certe ne vera sekto. Tamen, la impresoj kiujn ne-esperantistoj ofte ricevas pri ĝi ne estas tute senbaza: fakte, ekzistas sektismaj trajtoj en Esperantio.

2. TEI: bazo de sektecoj

La kerno de la Tradicia Esperantista Ideologio (TEI) estas la *monda lingvo-problemo*. Laŭ TEI la multlingveco kaŭzas aron da problemoj: enormajn traduk-kostojn, malebligon aŭ malhelpon de internaciaj kontaktoj, reciproke nekonon inter la popoloj kaj pro tio neŝatoni aŭ eĉ militon, k.a.

Uzo de nacia lingvo, laŭ TEI, nepre ne povas helpi. Popolo kies lingvo estus uzata havus tro da avantaĝoj super la aliaj. Tial ĉiuj ŝtatoj de la mondo devas enkonduki Esperanton kiel devigan fakon en la lernejojn. Esperanto estas lingvo neŭtrala, perfekta, logika, internacia, facile lernebla ktp.

La “ĝenerala enkonduko kaj agnosko de Esperanto” estus la t.n. *fina venko*. Tiu paŝo, laŭ TEI, forigos la “lingvan problemon”. Esperanto tial estas destinita fariĝi *dua lingvo por ĉiu*. Nuna apliko de Esperanto estas eble respektinda, sed malproksima de la “vera celo”. Kiel aliaj grandaj inventoj — libropresado, telefono, aŭtomobilo ktp —, tiel ankaŭ Esperanto iam fine glore venkos. Avangarda grupo el idealistaj, pacamaj, inteligentaj bonuloj ja lernis jam Esperanton.

3. Prijuĝo kaj kritiko

TEI estas tre disvastiĝinta koncepto en Esperantio, sed en multaj diferencaj nuancoj. Krom naivaj konkeremaj esperantistoj ekzistas ankaŭ multaj

kiuj subtenas nur kelkajn TEI-ideojn kaj konscias pri la amplekseco de la temo. Kiel aliaj ideologioj, TEI mikas realajn problemojn kaj simplajn solvojn en unu koncepton. La fakto ke la civitanoj de Eŭropa Unio parolas diferencajn lingvojn, ja vere kaŭzas problemojn. Sed “ĝeneraligo de Esperanto” ne tuj forigos ĉiujn “lingvajn problemojn”!

Signo de sekteco estas certe unuavice la “avangarda sinkompreno” de la ĝisostaj TEI-anoj. Oni ĉiam misfidu kiam grupo kredas ke ĝi scias la simplajn solvojn kiujn la stulta homaro ignoras.

Pri la “religiaj trajtoj” de (parto de) la Esperanto-movado oni povas legi ekzemple en *senlegenda biografio de L.L. Zamenhof* de ludovikito. Laŭ la psikoanalizisto Flügel (1925) la karaktero de la movado estas kvazaŭ-religia. La plimulto de la esperantistoj ne estas tiom amikoj de instrumento por internacia komunikado kiom anoj de “interna ideo”. Por multaj el ili Zamenhof estas ideala “patro” kun amanta afableco kaj kun la povo krei. Lia amo al la homaro estis ja la instigo fondi Esperanton.

Interesa signo estas ankaŭ la netoleremo kontraŭ herezoj. Bela ekzemplo: la “kontraŭ-raŭmismo” de UEA-prezidinto Tonkin. La Manifesto de Raŭmo (1980) ja skeptikas pri multaj TEI-ideoj: “la dua lingvo por ĉiu; la angla lingvo estas nia malamiko; UN devas adopti Esperanton; ktp” estas tie nomataj “mitoj”. Kulmino de la herezo estas la frazo: “Ni kredas, ke [...] la oficialigo de Esperanto estas nek verŝajna nek esenca”. Tonkin reagis: “Ekzistas iuj voĉoj, kiuj diras, ke esperanto jam sukcesis, kaj ke la esperanto-movado ne bezonas disvastiĝi [...]. Tiu spirito, almenaŭ certgrade, kuŝis malantaŭ la deklaro [de] Raŭmo, Finnlando. Tiu raŭmismo, kiu baze asertas, ke estas pli grave [scii, utiligi kaj ĝui Esperanton]

ol konvinki aliajn aliĝi, havas certan agrablan allogon.” (Humphrey Tonkin: “Ĉu nur kultivi nian ĝardenon?”, *Evento*, 1994, feb./2, p. 1)

Tio estas la plej akra riproĉo kiun TEI-ano povas eldiri: “Raŭmistoj ne volas disvastigi Esperanton”. Fakte, la Manifesto de Raŭmo eksplicite jesas disvastigon: “Ni celas disvastigi Esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi pozitivajn valorojn”! Sed skeptikon kontraŭ la “fina venko” — tian blasfemon — TEI-ano eble pardonas al neesperantisto, sed certe ne al “batalanto el la propra tendaro”!

4. Danĝeroj

1. Tia simplisma priskribo de la “monda lingvo-problemo” ŝajnas ke esperantistoj estas kontraŭ (la lernado de) aliaj lingvoj aŭ eĉ celas la forigon de aliaj lingvoj.

2. TEI kreas tre apartajn ideojn kaj mistifikas pri temoj kiujn oni devas pristudi science (ekzemple internaciajn kontaktojn).

3. “Dua lingvo por ĉiu”: tiu slogano postulas ke ĉiuj neesperantistoj nepre lernu Esperanton. Tial homo kiu ĝenerale ne malŝatus Esperanton povas kontraŭi ĝin, ĉar li mem ne havas tempon/okazon/emon lerni ĝin.

4. Estas tre *seniluziige* strebi dum jardekoj al celo kiu ne proksimiĝas. Homoj kiuj jam kiel junuloj lernis Esperanton, maljunaĝe mortis ne vidante “finan venkon”.

5. En TEI esencas nur la *fina venko*, tial “TEI-Esperanto” estas ĉefe *ideo*. Sekve, ankaŭ homoj informitaj pri Esperanto rigardas ĝin ne kiel seriozan realaĵon de hodiaŭ, sed kiel *utopion* de postmorgaŭo aŭ — verŝajne — neniamo.

5. For la Esperantan sektismon!

Ĉiu esperantisto demandu sin kiagrade la supre menciitaj karakterizaĵoj validas por li aŭ ŝi. Kiagrade vi sentas vin ano de TEI? Se vi kredas pri “fina venko de Esperanto”: ĉu ĝi estas laŭ vi *ebla* aŭ *nepra* evento? Kio estas la “monda lingvo-problemo”? Ĉu Esperanto estas “normala lingvo”, ĉu “perfekta”? Ĉu vi iam sentis ke neesperantistoj traktas vin kiel sektanon?

Fine, demando por Esperanto-informado (finvenkistoj ja tiom vervas pri disvastigo): kiagrade esperantistoj mem — neintence — riskas malhelpi la progreson de Esperanto?

Ziko M. Sikosek (Germanio)

Reagoj



Pri movado

Partopreni en la socia dialogo

La novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA, LEE Chong-Yeong (jan., p. 1), invitas nin i.a. krei grupon de “socie influaj homoj kiuj ne parolas Esperanton sed ŝatas la ideon ligitan al la lingvo”. Jacques Schram (Belgio) “tute ne komprenas kial krei tian grupon” (apr., p. 77). “Ĉu mi nun, kiel prezidanto de mia E-grupo, komencu fi-flati la politikajn potenculojn de mia urbo?”, Schram daŭrigas. Li estas “konvinkita ke la politika mondo akceptos nin nur kiam ni montros nin granda, potenca grupo”.

Mi laŭdis la mesaĝon, ĉar la prezidanto prave instigas nin ke ni atentigu la homojn pri nia komuna lingva problemo kaj pri ligitaj aspektoj kiel homaj rajtoj, lingvodiverseco, superregado de kelkaj lingvoj, pozicio de minoritataj lingvoj kaj aliaj aspektoj. Ni fi-flatu nenium, sed ni partoprenu en la socia dialogo.

Ekzemplo: la fakultato pri lingvoj de la universitato de Amsterdamo antaŭ nelonge konsentis starigi specialan katedron pri “interlingvistiko kaj Esperanto”, kiu espereble ekfunkcios en 1997. Precipe *dank’ al simpatiantoj ne-esperantistaj* ni sukcesis. Intence ni invitis al kunlaboro en nia organiza komitato socie influajn homojn kiujn la universitato plej verŝajne pli fidus ol nur esperantistojn. Ni starigis oficialan rekomendkomitaton kiu konsistas el tre bone konataj kaj influrikaj homoj (i.a. la ministro pri edukado), kiuj ne rilatas al Esperanto mem, sed apogas sciencon esploron pri lingvoj kaj la monda lingvo-problemo (vd. ankaŭ mian artikolon en jun. 1994, p. 104).

Kelkfoje mi jam pledis ke UEA kaj la landaj asocioj membrigu ne nur esperantistojn sed ankaŭ simpatiantojn (vidu laborplanon 1995 de Eŭropa Esperanto-Unio). Nepre multe da personoj interesiĝas pri unu el la statutaj celoj de UEA: *agadi por la solvo de la lingvo-problemo en*

internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon.

Tiam ni tutcerte akiros pli da membroj kaj ankaŭ da potenco, kiujn Jacques Schram deziras.

Hans Erasmus (Nederlando)

Per flugiloj de la reta poŝto

Tiuj kiuj ankoraŭ opinias ke Moldur frenezas (“Virtuala realo”, dec., p. 202), atendu la lanĉon de reviziita PIV en kompakta disko.

UEA devas profiti la flugilojn de la favora vento, aktivigi sian gazetaran servon, kaj pere de retpoŝto, ĉiumonate, provizi la televidajn kaj gazetajn redakciojn per taŭga inform-materialo.

Roberto Resende (Brazilo)

Pri lingvo

Ĉu floru ĉiuj floroj?

Skribante aŭ parolante pri lingvaj aferoj, mi ofte mencias la revuon *Esperanto* kiel bonan ekzemplon, kiu ĉiam obeas la Fundamenton malgraŭ ŝanĝiĝoj de la redaktoroj. Tamen en apr., p. 71, sub la portretoj de Goethe kaj Schiller ni legas ke “iliajn kaj alies germanajn majstroverkojn peris Esperanten Reinhard Haupenthal”. La vorteto *alies* supraĵe aspektas kvazaŭ-Esperanta, kvankam ĝi estas tute fuŝa rilate la vortaron kaj gramatikon de Esperanto. Oni trovas ie ankaŭ *alie*, *aliel*. Ili estas faritaj imitante la tabelon de korelativoj. La inventintoj de tiaj bastardoj ne nur demonstras sian nesufiĉan alproprigon de la lingvo, sed en ĝian logikan strukturon enkondukas tute senbezonaĵajn elementojn, gvidantajn al miskomprenoj. Se la vorto *alia* estos ŝovita en la tabelon de korelativoj, aperos dezirantoj ŝovi tien ankaŭ aliajn adjektivojn aŭ pronomojn. Ĉar *Esperanto* estas oficiala organo de UEA, ĝi devas esti presata en la lingvo Esperanto. La revuo devus akre kritiki ĉiun provon krei reform-Esperanton, ankaŭ tiun de la recenzata traduko de R. Haupenthal, kiu

uzis multegon da neologismoj. Tamen la recenzanto M. Nervi pensas ke “floru ĉiuj floroj”.

Adomas Vaitilavičius (Litovio)

Kiu estis Stillman?

En junio (p. 120) mi legis ke Ezra Clark Stillman estis “en la direktoraro de IALA, la asocio kiu en 1951 publikigis la lingvo-projekton Interlingua”. Kial vi skribas nigriĝe “lingvoprojekto”? Interlingua ja ne estas *projekto*, sed, same kiel Esperanto, *lingvo*, kiu havas siajn adeptojn en la tuta mondo, siajn literaturon kaj organizojn. Krome, Stillman ne simple “membris en la direktoraro de IALA”: li estis la tre aktiva direktoro kiu post la periodo de Collinson malfermis novan paĝon en la historio de IALA, eliminante ĉiun influon de Esperanto kaj de la aliaj lingvoj artefaritaj en la laboroj de la organizo. Stillman estis la ĉefa persono kiu finfine metis IALA sur la vojon de la naturalismo, kio rezultigis la hodiaŭan Interlingua.

Piet Cleij (Nederlando)

Kio estas recenzo, kiu estas esperantologo?

Se mi legas tekstojn sub la rubriko “Recenzoj”, mi esperas informiĝi pri la enhavo de la libroj tie traktitaj. Mi ne nepre bezonas konvinkiĝi ke ankaŭ la recenzisto estas saĝa knabo. La *eseistan* talenton de P. Daŝgupto (apr., p. 72) mi ja pretas admiri. Sed *recenzo* eble pli bone helpus la libroservon de UEA vendi *La rondo familia* de N. Rašić.

Mi ne scias kion M. Fernández, recenzinta la eseojn de Karolo Piĉ (majo, p. 94), komprenas sub la nocio “interlingvistiko” kaj “esperantologio”. Generale temas pri *sciencaj* disciplinoj. Sed sciencoco ne karakterizas la eseojn de Piĉ. Ili enhavas tiom da lingvistike fantaziaj kaj absurdaj asertoj ke eĉ la recenzanto ne povis preteratenti kelkajn kaj ilin citis. . . Ke Haupenthal en sia postparolo magias el Piĉ “elstaran esperantologon kies lingvaj eseoj povas inde viciĝi apud la kaloĉaja *Lingvo, stilo, formo* kaj la varingjena *Lingvo kaj vivo*” (p. 397) estas ofendo al Kalocsay kaj Waringhien, kaj unu el la plioftigantaj absurdaĵoj de la 50-jariĝinta festlibrinto.

Detlev Blanke (Germanio)



• Ĉinio: Ĉu vi estis en Liaoning?

Okaze de sia 6-a kongreso (9-11 aŭg.), Liaoning-provinca E-Asocio serĉas kontakton kun e-istoj kiuj post la Pekina UK (1986) vizitis Liaoning. Skribu al Wu Guojiang, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fushun Liaoning; ☎+81/413/233-22-07.

• Francio: Revkastelo gastigas modelan klason

La organizantino de la Printempa Internacia Renkontiĝo en Grésillon (13-20 apr.), Paulette Naulet, devis limigi la nombron de partoprenantoj, ĉar estis pli da interesatoj ol la Kulturdomo kapablas akcepti: partoprenis 40 infanoj el Francio, 6 el Pollando kaj 28 el Svedio. La svedaj infanoj venis el Hjulsta, parto de Stokholmo kun multaj enmigrintoj. Pli frue konataj kiel "tiu problema klaso 9A", ili fariĝis, dank' al la projekto lerni Esperanton por viziti francan kastelon, "modela klaso" de sia lernejo. (SAT-Amikaro, *La Espero*)

• Israelo: Wandel ekzamenata

La oficiala abiturienta ekzameno pri la hebrea lingvo, distribuita al cent mil mezlernejoj komence de junio, enhavis dupaĝan tekston prenitajn el la artikolo "Esperanto kaj la problemoj de internacia komunikado" de UEA-estrarano Amri Wandel. La ekzamenatoj devis prijuĝi ĉu nur neŭtrala lingvo povas roli kiel internacia lingvo, kompari inter la angla kaj Esperanto, kaj trovi kie la ofico de la verkinto (i.a. membro de la Akademio de E-o) kaŭzas subjektivecon. (A. Wandel)

• Kroatio: Lins esploris

Ulrich Lins vizitis Kroation la 1-an kaj 2-an de majo por esplori pri la kroata E-movado, specife pri la agadaroj de Ivo Lapenna en Kroatio. Veteranoj Ivo Borovečki, Zlata Flego kaj Lucija Borčić provizis lin per abundaj informoj. Lins ankaŭ renkontiĝis kun membroj de la Zagreba E-societo Bude Borjan, kaj akceptis lin la prezidanto de Kroata E-Ligo, Dalibor Brozović. Zagrebaj gazetoj informis pri la vizito. (S. Štítec)



• Argentino: Bariloche sur la verda mapo

Malgraŭ plurmil-kilometra distanco, al Junulara Tendumado en la patagonia urbo Bariloche (4-7 apr.) venis ĉ. 25 e-istoj el diversaj landopartoj (jen kelkaj el ili), i.a. estraranoj de Argentina E-Ligo. Bariloche E-Rondo planas novan renkontiĝon (14-21 dec.) en tiu belnatura regiono. En la Universitato de Bariloche oni baldaŭ ekinstruos Esperanton. (W. Schad, *Fenikso en Ameriko*)



• Arto: Por okuloj kaj oreloj

Ekde 1994 la muzikistoj Franz-Georg kaj Rita Rössler publike prezentas ankaŭ siajn bildajn kaj plastikajn verkojn. Okazis jam dek ekspozicioj en Germanio, Hungario, Svedio kaj Ĉeĥio. Pere de E-kontaktoj jam la duan fojon oni montris iliajn artaĵojn en Pápa (Hungario). Kune kun muziko de F.G. Rössler la urbestro malfermis la 28-an de marto ties ekspozicion en la Urba Biblioteko; la postan tagon ekprezentiĝis pentraĵoj kaj grafikaĵoj de Rita Rössler en la Reformacia Kolegio.

Jela sama okazo, Franz-Georg Rössler estis ĵuriano de la 7-a Tutlanda Deklamkonkurso Esperanta (29-31 marto), kune kun Miklós Fehér, Stefan MacGill kaj Ivan Špoljarec. El ĉ. 50 konkursantoj hungaraj kaj kroataj, en la diversaj kategorioj gajnis S. Németh, G. Siffel, K. Borzák kaj M. Molnár. (J. Németh)

• Nederlando: Aŭskultu intervjuon

La 22-an de julio ateisma asocio disaŭdigis radio-intervjuon pri Esperanto (Hilversum 3, 298 m, 17.45-18.00), kiu tuŝos ankaŭ *La infana raso* de W. Auld. (W. Verloren van Themaat)

• Portugalio: Edukministerio volas defion

Responde al peticio de Portugala Esperanto-Asocio farita en 1993, la kabinetestro de la edukministerio, Alexandre Rosa, akceptis en januaro la PEA-estraranojn Faria de Bastos, Werther Sacramento kaj António Martins. La ministerio garantias la akcepton de mezlerneja E-instruado tie kie ekzistas preta instruisto kaj interesata lernantaro: "prezentu al ni konkretan proponon kaj vi havos oficialan E-instruadon! Defiu nin!" (*Nia Bulteno*)

• Komerco: Tempo estas mono

Laŭ iniciato de prezidanto Franz Josef Braun, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) senkoste dissendis al ĉiuj siaj membroj la broŝuron *La aboco de tempoplanado* de Lothar J. Seiwert, kiun UEA eldonis en sia serio "Konsilaroj por Aktivuloj". Braun opinias ke la broŝuro helpas al ĉiu IKEF-membro gajni liberegan tempon, uzeblan por akceptigo kaj enkonduko de Esperanto en komerco kaj ekonomio. (*La Merkato*)

Esperanto Komerca Agado proponos dum la 65-a Itala E-Kongreso (Feraro, 24-30. aŭg.) E-kurson por junaj internaciaj entreprenistoj. La kernon de la projekto konsistigas samtempa estigo de similaj kursoj fare de partneraj asocioj, grupoj aŭ institucioj en Meza kaj Orienta Eŭropo. Kontakto: EKA, p/a Triesta E-Asocio, via Crispi 43, IT-34125 Trieste.

• Radio: Varsovio kvarfoje tage

Jam ekde la 31-a de marto Pola Radio havas tri ĉiutagajn Esperanto-elsendojn, el kiuj unu estas nur satelita (20.00 laŭ mez-eŭropa somera tempo). La 11-an de junio aldoniĝis kvara, matena elsendo satelita, je 6.30. (A. Pettyn)

Anoncetoj



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon ĉe la interna kovrilpaĝo.

Vizitu Maastricht Esperanto-Domo: tranoktado 35 gld pp fakso/tel +31-43-213.247; retpoŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

Kiu juna paro interesiĝas transpreni Esperanto-Press? Sendu detalojn pri vi kaj via ĝisnuna Esperanto-agado al R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, K0L 1B0. En septembro/oktobro mi probable estos en Eŭropo kaj povus viziti interesatojn.

Deziras korespondi tutmonde 40-jara polino: Urszula Oczachowska, ul. Floriańska 16/30, PL-44-217 Rybnik, Pollando.

Esperanta Turismo-servo Tanzanio (Sylvester N. Nyinyimbe, P.O.B. 147, Bunda, Tanzanio) deziras kontakti vojaĝantojn kaj turismajn entreprenojn interesatajn pri turismo en Tanzanio. Korespondas Esperante kaj angle. Aldonu 2 irk-ojn por frua respondo.

Poŝt-markojn aŭ/kaj -kartojn kun papilioj bv. sendi al mi: Japana Esperanto-domo (vd. nov. '94, p. 181) iom post iom enradikiĝas en la urbeto Nagasaka-ĉo kun papilia simbolo. Al la urbetanoj mi demonstru la praktikecon de Esperanto per tiu

ĉi kolekto el la tuta mondo pere de Esperanto. Mi atendas viajn bonkorajn helpojn kun antaŭdanko. MICUKAŬA Sumiko, 33 Kamihommaĉi, Ŝiĉiku, Kita-ku, Kioto, 603 Japanio.

Infanon malsanan je leŭkemio pro la Ĉernobila akcidento volas helpi germana esperantisto. Unu el la gepatroj, eventuale ankaŭ la infano, parolu Esperanton. Se vi konas tian bezonanton de helpo, sciigu Polan Radion (P.O.B. 46, PL-00-977, Warszawa, Pollando; ☎+48/2/645-59-17; ✉rafalk@radio.com.pl).

Esperanto-servon malfermas Daniel M. Muraya, P.O.B. 79276, Nairobi, Kenjo (☎+254/561-309), direktoro de sukcesa vojaĝagentejo. Turistojn esperantistajn gvidos NZANIYE Jessé Le-Prince el Ruando, kiu aktivas en la rifuĝejo de Kakuma (vd. jan., p. 13).

M. le Maire, FR-09120 St-Félix-de-Rieutort, Francio: bv. gratuli la vilaĝestron, kiu inaŭguros straton Esperanto la 21-an de septembro.

Personne



• Gabrielli: Ĵurnalisma ormedalo

En la jarkunveno de la Markio-regiona konsilio de Itala Asocio de Ĵurnalistoj, la 31-an de marto, Lina Gabrielli ricevis oran medalon pro sia 40-jara profesia aktivado. Aŭtoro de pluraj Esperantaj novelaroj kaj poemaroj, multlibra eldonisto, ŝi ankaŭ prizorgas de 1962 la dulingvan bulletonon *Voce del Centro Esperantista Piceno*, kies 225-a numero ĵus aperis.

• Gorbaĉov: Rememoris E-on

Mihail Gorbaĉov, eks-prezidento de Sovetio, sendis mesaĝon al Sanktpeterburgaj e-istoj, petante la "karajn samideanojn" "kunlabori por konigi al la popoloj de Rusio [lian] programon por la prezidenta elekto de Rusio". *Ruslanda Esperantisto* raportis pri tio sub la titolo "La unua sovetunia prezidanto rememoris pri Esperanto", verŝajne alude al la fojo kiam, komence



de 1987, Gorbaĉov respondis jene al surstrata demando: "... antaŭ Esperanto mi donus prioritaton al nur unu afero — al la renovigado. Kiam ni finos la renovigadon, tiam ni komencos pri Esperanto ..."

Laŭ unuanima decido de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) la 7-an de marto, Gorbaĉov ricevis la titolon "profesoro pri internacia juro". En dankletero al la AIS-prezidanto Helmar Frank, Gorbaĉov deziris sukcesojn al AIS kaj esprimis pretecon kunlabori. (*Scienco kaj Kulturo*)

• Havel: Alte protektaj vortoj

La Alta Protektanto de la 81-a UK, prezidento Václav Havel, skribis al UEA-membrino Jitka Skalická, kiu laboras en la kancelario de la Praga kardinalo Vlk, esperantisto: "Ĉiu plua lingvo pliriĉigas la homon, ĉar li povas ekkonadi la mondon pli komplekse. Tio kompreneble rilatas ankaŭ Esperanton." Jam pli frue Havel agnoskis en privata interparolo kun televida kameraisto F. Zelinka la ekzistarojn de Esperanto. (J. Mařík)

• Llech-Walter: Omaĝo je 90 jaroj

René Llech-Walter, veterano de la franca kaj internacia E-movado, iama estrarano de UEA, defendanto de la kataluna lingvo en Rusiljono (Francio), festis sian 90-an naskiĝtagon en la Kongresa Palaco de Perpinjano, la 5-an de majo. En la impona omaĝo partoprenis la vicurbestro, eminentuloj kaj esperantistoj lokaj kaj el Katalunio, i.a. la prezidanto de Kataluna E-Asocio, Josep Franquesa. La prezidanto de Institutio de la Kataluna Beletro, Oriol Pi de Cabanyes, donacis al la festato Esperantan libron, la ĵus aperintan poemaron *Pluralogo* de Vimala Devi. (KEA, H. Alos)

Arvid JOHANSSON (1911-1996), lerninta Esperanton aŭtodidakte en 1928, delegito en Huskvarna (Svedio) dum 40 jaroj, mortis la 20-an de februaro.

Rajmundo LAVAL (1900-1996), konata pseŭdonime kiel Valo, forpasis la 18-an de marto. Esperantisto ekde 1912, li estis ano de la kabareta rondo de Raymond Schwartz, kies verkojn kaj revuon *La Pirato* li ilustris. Li funkciis kiel kasisto de la Pariz-Regiona Federacio de la landa asocio SFPE en la 20-aj jaroj, fondis grupon en Joinville-Champigny (1923) kaj kunfondis E-grupon en Paŭo (1946). En 1934 li aliĝis al Sennacieca Asocio Tutmonda, kaj korespondis kun Lanti. Post emeritiĝo, li dediĉis sin al tradukado kaj verkado: sekretario de la Literatura Komitato de SAT ekde 1961, kunrevizianto de la lernolibro *Cours Rationnel* (1973), li aperigis ekde 1975 ĉe la Broŝurservo de SAT 22 titolojn, i.a. verkojn de Lamarck, Paskalo, Han Riner, Kropotkin (kuntraduko), *La poemo de Rodano* de Frederi Mistral (el la provenca), aŭtobiografion en kvar volumetoj, kaj laste kolekton de studoj kaj artikoloj, *Vortoj de Valo* (1995). Ĉi tiun eniris i.a. liaj kontribuoj al la

revuo *Laŭtel*, en kiu li havis konstantan rubrikon, "Vortoj de maljunulo", de 1982 ĝis sia lasta vivmonato.

Lorenzo LONGONI (1920-1996), kanoniko de la katedralo de Milano, spirita asistanto de Itala Katolika Unuiĝo E-ista kaj de la Milana Katolika E-Centro, forpasis la 21-an de majo.

André MARTIN (1939-1996), antaŭe fakdelegito pri paco, iama ĉefredaktoro de *Le Drapeau Rouge* (gazeto de la Belgia Komunista Partio), mortis la 1-an de majo. Li sciis kunligi siajn sindikatan laboron kaj Esperantan agadon per multaj iniciatoj.



Hermann D. TAUTORAT (1944-1996) forpasis la 19-an de majo en Berlino, kies E-vivon li decide influis dum kvara jarcento. Li gvidis kursojn ekde 1970, modernigis la informadan laboron de E-Ligo Berlin, prizorgis ties bibliotekon kaj arkivon.

Neniam formale je la organiza pinto de la Berlina movado, li tamen estis — kun sia edzino Ina — ĝia koro mem: centoj da gastoj tranoktis pasportserve en lia okcident-Berlina hejmo aŭ kunvenis ĉe li en la fama "jaŭda rondo", neniam paŭzinta ekde sia komenco en 1974.

Petar VUKOMANOVIĆ (1926-1996) mortis la 27-an de majo en Beogrado. E-isto ekde 1940, li funkciis kiel la unua prezidanto de Jugoslavia Asocio de Pedagogoj-E-istoj (de 1958), ĝenerala sekretario de Jugoslavia E-Ligo (1961-65), kaj unu el la ĉefaj gvidantoj de la Internacia Konferenco de Lernejoj kie Esperanto estas instruata (Beogrado, 1963). Li fondis Societon de Amikoj de Esperanto kaj lastatempe okupiĝis pri movadhistorio.

Jeannie WILSON (1895-1996), la plej aĝa dumviva membro de UEA, delegito pri edukado kaj kvakerismo ĝis 1992, mortis en marto, en Wanganui (Nov-Zelando).

Richard WLUKA (1907-1996), delegito en Hanovro pri filatelo, fervojoj kaj kolektrado, mortis lastatempe en tiu urbo.

OFICIALA INFORMILO

NOVJORKA OFICEJO DE UEA
SUBTENANTO (minimumo \$25):
Finnlando: Hemmo Tietti.

PATRONOJ DE TEJO 1996

Belgio: Elfriede Ernst. Brazilo: Wilson Pereira Deslandes. Finnlando: Allan Mehtonen. Francio: Pierre Lelièvre; Denise Loisel. Hispanio: Miquel Gomez i Miralles. Japanio: Ivao Katô.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Aŭstrio: Florence Cool. Belgio: Michael Cwik. Britio: Sybil V. Sly. Francio: Henriette Cortes; Jeannine Croze; Auguste Huberdeau. Hispanio: Laurentina Parada De Palacios; Jesús Raposo Montero. Italio: Catina Dazzini; Maria Teresa Malatesta. Kanado: Marijke Meijer. Korea Resp.: Hŭa-gong Bag; Wonsik Kim. Nederlando: Catrien Bossong-Singer. Svedio: Tore Fors; Boo Mee Kim-Lindblom; Malte Smith. Usono: Teuntje E. Goldman; Thomas A. Goldman.

DONACIOJ 1996 (gld.)
ĝis la 31-a de majo

Fondaĵo Afriko: E-Klubo de Norrköping 253,25. Sumo ĉi-jara 6893,61.
Fondaĵo Ameriko: Argentino: T. Alaniz 15,23. Francio: R. Triolle 305,57. Kanado: J.E. Smythe 12,80. Usono: D. Holland 40,00; B. Maxey 100,00. Diversaj malgrandaj: 1,60. Sumo ĉi-jara 691,03.
Fondaĵo Belarta: Svedio: S. Johansson 24,00. Sumo ĉi-jara 24,00.
Fondaĵo Canuto: Britio: A. Montesinos 14,00. Finnlando: H. Tietti 100,00. Francio: M. Schmidt 32,60. Germanio: G. Macioszek 335,49; H. Otto 32,43; M. Vitalys 200,00. Hispanio: J. Raposo Montero 20,00. Irlando: M. Mullarney 50,00. Japanio (por aziaj e-istoj): Y. Aida 64,30; S. Aikawa 61,84; N. Hatayama 30,92; A. Kagami 30,92; S. Koga 61,84; T. Konisi 80,38; Y. Kuroyanagi 61,84; H. Miedema 30,92; Mijazaki E-Societo 32,15; I. Nakamura 32,15; H. Obara 30,92; H. Onda 30,92; Y. Oozato 32,15; M. Saiki 30,92; Y. Sakamoto 15,46; M. Takezaki 32,15; Y. Tanaka 80,37; K. Ueno 61,84; M. Wada 30,92. Korea Resp.: H. Bag 20,00; K. Choi 10,00; U. Kim 10,00; W. Kim 20,00;

Y. Kim 20,00; C. Lee 20,00. J. Lee 10,00; Y. Ma 10,00; T. Song 20,00. Sumo ĉi-jara 5489,42.

Fondaĵo Saliko: Usono: J. Amis 8,56. Sumo ĉi-jara 8,56.

Ĝenerala Kaso: Danio: E.H. Olsen 57,90. Germanio: I. Winn 14,54. Kanado: D. Hackett 31,50. Usono: S.M. Klimowicz 144,28. Diversaj malgrandaj: 4,12. Sumo ĉi-jara 4263,57.

Konto Espero: Finnlando: H. Tietti 50,00. Francio: H. Cortes 39,78; C. Dehan 33,15; Féd Esp. de l'Auvergne et du Massif Central 136,78. Sumo ĉi-jara 1254,01.

Propaganda Konto: Nederlando: F.H. Kat 100,00; G.F. Makkink 1000,00. Sumo ĉi-jara 1116,81.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Britio: A. Montesinos 25,00. Ĉeĥio: Z. Bačiková 6,25. Finnlando: H. Tietti 50,00. Francio: G. Treanton 15,00. Germanio: H-J. Gunkel 20,00. Hispanio: J. Raposo Montero 20,00. Sumo ĉi-jara 2091,67.

Volontula Fondaĵo: Brazilo: C.M. Lemos 150,00. Irlando: M. Mullarney 50,00. Norvegio: E. Matland 75,00. Sumo ĉi-jara 430,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

LIBROJ PRI NOVA BIOLOGIA NOMENKLATURO (N.B.N.)

**Ekkonu la sistemon, kiu uzas Esperanton
por fari sciencajn nomojn de bestoj kaj plantoj!**

Konsultu la jam eldonitajn librojn!

Jen la plej interesaj (la prezoj estas en Belgaj frankoj):

<i>La Sistemo N.B.N.</i> (Nova Biologia Nomenklatur)	94p, 1991, 200 BF
<i>Decidoj 1-25</i>	72p, 1996 (2a eld.), 250 BF
<i>Decidoj 26-50</i>	70p, 1993, 250 BF
<i>Decidoj 51-75</i>	67p, 1994, 250 BF
<i>Decidoj 76-100</i>	75p, 1996, 250 BF
<i>Decidoj 101-125</i>	79p, 1996, 250 BF
<i>Leksikono NBN-nomoj 1-500</i>	101p, 1991, 250 BF
<i>Leksikono NBN-nomoj 501-1000</i>	92p, 1994, 250 BF
<i>Repertorio NBN-nomoj 1-1400</i>	107p, 1995, 300 BF



La libroj estas aĉeteblaj ĉe la
Asocio por la Enkonduko de N.B.N.
Hertendreef 12, BE-2920 Kalmthout, Belgio.

Membroj havas rabaton de 20%, oficialaj membroj de 30%.

Tiuj libroj estas aĉeteblaj ankaŭ ĉe la libroservoj de
Universala Esperanto-Asocio (UEA), Flandra Esperanto-
Ligo (FEL) kaj Bavara Esperanto-Ligo (BEL).

Edward Symoens:

BIBLIOGRAFO DE DISERTACIOJ PRI ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO




*Tiu ĉi grava informfonto (1989; 159p.)
estas nun ĝisdatigita per 63-paĝa
suplemento. Kune ili priskribas
preskaŭ 250 universitatajn studojn.*

Baza libro 21,00 gld.; suplemento 7,20 gld. *Oferto:* Ambaŭ kune 23,50 gld.

La Sesa Esperanta kaj Politika Semajno en Komańcza, Pollando
Lundo, 30.09.1996 ĝis lundo, 07.10.1996



Detala programo:
Eŭropa Federacio
Wojciech Soczówka
Rathausstr. 92 (Mariendorf)
DE-12105 Berlin



**La Jarlibro akompanos vin tra tuta
jaro... donu taŭgan veston al ĝi!**

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan
kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin
kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU,
imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

Antaŭ 50 jaroj datiĝis la lasta letero de
talenta knabino, pereonta pro rasismo.

Legu, legigu

*Anne Frank
ne estas de hieraŭ*



*Speciala prezo ĝis la 30-a
de septembro 1996:*
~~15,00~~ 9,90 gld.

trad. Nora Bartels. 194p.

LA NOVA REALISMO

de Bruno Vogelmann

185 p. 19,80 gld. Pri Nova Pensado, Religieco
Novstila, homaron unuiganta mondkoncepto.
Premio Deguĉi, Premio FAME. Tradukita en
26 naciajn lingvojn. Havebla de ĉiuj libroservoj.
El nepagipovaj landoj skribu al la aŭtoro,
pk 1564, DE-74555 Crailsheim, Germanio.

*"Se ekzistus en la realo la lando Esperantujo,
jen unu el la tekstoj, kiujn oni certe legus
en ĉiuj mezgradaj lernejoj."*

RENATO CORSETTI



La nova 18-a eldono, prinotita de prof. G.
Waringhien, faras maksimumajn klopodojn
tekste reiri al la 1-a eldono de 1903, sed
grafike resti ĉe la bela 17-a eldono de 1954.

18 + 446 paĝoj. Tole bindita kun legrubando kaj
kromkovrilo. Prezo: 48,00 guldenoj (32,00 gld. ekde
3 ekzempleroj).

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŜIAKTO estas gazeto
por ĉiu, kiu serĉas interesan
legajon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŜIAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1996 **KŜIAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

**LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EPIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!**



Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Rotterdamo: UEA 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj*
n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

KIU MURDIS LA BELAN DONELLA MANTOVANI?



LA ENKETO KONDUKAS
JUĜISTON LAMBERTI EN
RETON DE PASIOJ KAJ
INTRIGOJ EN MALGRANDA
ITALA URBO.

TIU TOSKANA SEPTEMBRO.

CORRADO TAVANTI, ISTVÁN ERTL.
BUDAPEŝTO: HEA, 1990. 138P. 21CM.
18,00 GLD. TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ.

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala*
jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo,
profesio, geedza stato, kiom da kores-
pondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri
kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn,
aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan
poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j)
korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj.
Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.




Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio

Tiu zumado ion signifas...

WINNIE-LA-PU

AN ESPERANTO VERSION OF
A. A. MILNE'S *WINNIE-THE-POOH*

Translated by Ivy Kellerman Reed
and Ralph A. Lewin



Illustrated by
ERNEST H. SHEPARD

Edited with an Introduction and Glossary
by Humphrey Tonkin

Reeldonita de UEA, 1992.
Tole bindita kun kromkovrilo. 27,00 gld.

MENDU DE LA LIBROSERVO DE UEA.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.